

(102)




Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
 Unu n-ro : 8 FF. Unujara abono kun adresaro : 40 FF
 Rekte ĝiri al pĉk-numero : 3371 74 M BORDEAUX, profite al :
 Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut



ALVOKO EŬROPA POR LA NUKLEA MALIMPLIKIĜO

Neniam en sia historio la homaro troviĝis fronte al tiel decida elekto. Ĝi implikas la estontecon, la ekziston de nia idaro, la destinon de la estontaj generacioj. Ĝi endanĝerigas la vivon sur la planedo. Pli ol iu ajn ĝi estas ankaŭ elekto de socio.

La atomindustrio estas veto pri la morto. Akumuliĝas la pruvoj pri noceco, kiun la laŭdintoj de la atomindustrio eĉ ne suspektis. Ili trompis sin kaj nin. Hodiaŭ evidentiĝas poluadoj, kiujn oni eĉ ne imagis antaŭ dek jaroj. Ili fontas el el-



fluaĵoj situantaj ene de permesataj normoj sed estigantaj koncentradojn de radioaktiveco danĝerajn por la venontaj jarcentoj.

La katastrofo de Ĉernobil, kies kon-

sekvencoj en la tempo kaj spaco senĉese pligraviĝas, konsumis en sia nuklea fajro la lastajn iluziojn. La funebra sonorado plu eĥas en la tuta Eŭropo.

Alia elekto estas ebla. La atomindustrio ne estas fatalo. Ni devas iri pli malproksimen kaj pli rapide en la ŝparado de energio. Ni povas ekspluati la egajn energifontojn simbioze kun la naturo. Tio estas elekti la vivon.

Iuj el la eŭropaj landoj tion komprenis. Ili ĉesigis aŭ almenaŭ bremsis siajn nukleajn programojn. Male, Francio persistas. Jam superekipita, premita sub la kosto de ekstravagancaj investoj, ĝi decidis, ke la unika merkato de 1993 estos la savoklapo por sia antaŭenfugo. Al la komerco de armiloj la nacio, kiu pretendas reprezenti la Homajn Rajtojn, aldonos en 1993 la liveradon de elektro al la tuta Eŭropo.

Endas lukti por rekonkeri la mastradon super nia destino. Ni estas nun en tiu senprecedenta historia momento, kiam la vivantoj tenas en siaj manoj la estontecon mem de la homaro.

Ni vokas al la eŭropaj popoloj. Niaj destinoj estas interligitaj. Francio transformita en eŭropan atomcentralon estas danĝero por la tuta Eŭropo.

Nur ĝenerala mobilizado ĉe la skalo de la kontinento indas je la defio.

Ĉiuj kune ni povas kaj devas triumfigi la vivon.

(Teksto verkita de "Vivre sans le danger nucléaire de Galfach",
1 bis, rue Ledru-Rollin, F 47000 AGEN. Esp-igo : AERA.)

Teksto kun peticio estas disponebla ankaŭ en aliaj lingvoj. Skribu !



GASTIGADO DE ESPERANTISTOJ

Jacqueline enkondukas :

Estas normale, ke esperantisto ŝatas havi kontaktojn kun homoj el aliaj landoj, aŭ eĉ aliaj kontinentoj. Unu el la manieroj havi tiajn kontaktojn estas fariĝi gastiganto, ekzemple aliĝante al la listoj de gastigantoj de la Pasporta Servo.

Kiel gastiganto de la Pasporta Servo, aŭ per aliaj rimedoj, mi gastigis plurajn dekojn da esperantistoj. La grandega plimulto de ili kondukis tute dece, ni babilis pri iliaj kaj mia landoj, kaj mi konservas bonan memoraĵon pri ilia gastado.

Tamen foje estas problemoj. La regulo de la Pasporta Servo ne devigas la gastiganton doni manĝojn. Plej ofte, mi tamen tion faras. Kiam mi mem gastigis, tio estis problemo, kiam tio ne estis antaŭe precizigita de la gastiganto. Kiel okcidentano, mi havas en ĉiuj landoj sufiĉe da mono por min nutri, eĉ en restoracioj. Sed estas pli agreble manĝi kun la gastigantoj. Nu, se nenio estas antaŭe precizigita, oni ne scias, ĉu oni devas reveni de promenado antaŭ aŭ post la vespermanĝo.

Cetere, la kutimaj horoj tre varias de unu lando al la alia. En Francio, se mia gasto revenas antaŭ la 18a horo, mi

mia debato

konjektas, ke li ne vespermanĝis, do mi lin invitas vespermanĝi kun mi. Ne devige pro tio, ke mi supozus, ke li ne havas monon, sed simple ĉar nervozigas min manĝi antaŭ homo, kiu nenion ricevas. Sed se mi matene demandas: "Je la kioma horo vi intencas reveni?", plej ofte la respondo estas: "Mi ne scias, tio dependas, kiom da vidindaĵoj mi vidos hodiaŭ." Do nenion mi povas plani.

Miaj koleginoj miras, ke mi pruntedonas al gasto la ŝlosilojn de mia hejmo, kaj nomas min malprudentulino. Nu, mi opinias, ke tio sklavigas min malpli ol atendi, ke mia gasto bonvolu reveni el sia promenado. Ĝis nun, neniu misuzis miajn ŝlosilojn.

Alia problemo estas, ke Francio postulas de alilandanoj ekster okcidenta Eŭropo, ke ili havu ateston pri gastigado. Foje, por havi tian ateston mi devas alfronti tutan proceduron ĉe la magistrato de mia urbo. Sed tio estas nenio, kompare kun la devo subskribi la frazon "Mi devontigas min pagi la resanigadon kaj reenhejmigadon de mia gasto, se li havos akcidenton aŭ malsaniĝos". Kiu aŭdacas subskribi tian promeson por homo, kiun li ne konas, nur pro tio, ke li estas esperantisto? Nu, mia eksedzo certigis min, ke poloj ne ricevas vizon por Francio, se ili ne aliĝas al asekuro, do, okaze de akcidento, mi povus rifuzi pagi. Mi konsilas do al gastigantoj sendi tiajn atestojn al tiuj, kiuj povas sendi fotokopion de sia aliĝilo al iu asekuro valida por la vizitota lando. Ja sen tia atesto ne eblas al gasto atingi Francion, do, se ĉiuj francaj esperantistoj hezitas sendi tiajn invitilojn, tio signifas, ke ili povos gastigi nur okcidentanojn. Laŭ franca leĝo, oni sciigu al la urba konsilantaro, kiam la gasto forlasis la francan teritorion post sia vizito. Tio signifas, ke, se post min la gasto vizitos aliajn francojn, de mi nekonatajn (ne ĉiujn francajn esperantistojn mi povas koni), nepre li devos telefoni tuj antaŭ sia foriro el Francio, por konfirmi la ĝustan daton deklarendan al la aŭtoritato. Se li forgesus, mi povus havi problemojn.

Se tio ankoraŭ ne malkuraĝigis vin, mi daŭrigu. Mi supozas, ke ĉiuj gastigantoj en grandaj urboj frontis almenaŭ unufoje en sia kariero de gastigantoj la problemon de

"esperantisto", kiu krom "bonan tagon" scipovas nenium vorton de la internacia lingvo. Iam, revenante hejmen post miaj propraj ferioj fine de julio, mi trovis en la leterkesto bildkarton de iu hungaro, kiu sciigis al mi, ke li venos la 5an de aŭgusto. Estis neniu adreso por eventuale skribi, ke tiu dato ne taŭgas por mi. Do, mi povis nur atendi lin. Li venis, restis kelkajn tagojn, kaj foriris, dirante ke li lasas al mi bagaĝojn, sed ke li revenos ilin preni. Komprenoble, tion li diris per vortaro, ĉar en esperanto li ne kapablus. Mi respondis, ke tio eblas, sed ke li ne revenu antaŭ la 15a de aŭgusto, ĉar post li mi gastigos hungaran familion, tiel ke li ne por ĉiuj estus loko en la loĝejo. Do li foriris, kaj alvenis la hungara familio, tute ĉarmaj gastoj, kiuj longe antaŭe interkonsentis kun mi pri la datoj de sia restado ĉe mi. Problemo estis, ke laŭ franca koncepto ne eblas loĝigi kvarpersonan familion en unu ĉambro. Sed laŭ hungara koncepto jes ja eblas. Tiam mi poste alkiutimiĝis al la vivo de orienteŭropanoj, mi pli bone komprenis. Do, unu ĉambron de mia duĉambra loĝejo ili okupis. Sed la hungaro, kiu ne scipovis esperanton, revenis la 13an de aŭgusto. Li klarigis al mi per vortaro, ke li ne plu havas monon, kaj intencas deponi juvelojn. Mi tute ne sciis, kie troviĝas tia deponejo en Strasburgo. En tiu epoko, mi ankoraŭ ne havis telefonon, do mi piediris kun li al la urbodomo por informiĝi. Afabla akceptistino donis al mi la adreson de la urba ofico, kiu okupiĝas pri tio. Sed ŝi aldonis, ke la 14a de aŭgusto estas tago de festo, do ke la morgaŭan tagon tiu ofico funkcios nur matene. Do bone, mi tajpis por mia gasto la precizan adreson de tiu ofico kaj la horojn de la malfermo, kaj mi pruntedonis al li planon. Vespere revenis la familio. La neesperantisto proponis, ke mi tranoktu kun li, ĉar la alia ĉambro estas okupita de la familio. Mi rifuzis, kaj iris dormi ĉe geamikoj. Komprenoble, bona propagando por esperanto estis por ili la fakto, ke pro esperanto mi eĉ ne plu povas dormi sub mia propra tegmento! La 14an de aŭgusto mi laboris dum la tuta tago. Kiam mi revenis, mi trovis en la salono mian planon de Strasburgo, kaj kun ĝi papereton kun la vorto "dankon".

Okazis alia komika aventuro. Juna jugoslavo alvenis

al mi post telefona alvoko. Mi montris al li la salonon, kiun mi uzas kiel gastoĉambron, la kuirejon kaj la necesojn, sed mi ne montris mian dormoĉambron, ĉar regis en ĝi, kiel kutime, jakelina malordo. Ni iom babilis en la salono. Li demandis min, ĉu mi vivas sole. Mi klarigis, ke mia pola edzo ankoraŭ atendas sian vizon por veni al mi. Li demandis min "Sed ĉu ne ĝenas, ke mi estas ĉe vi, dum via edzo estas for ?". Mi respondis, ke tio ne ĝenas. Fine de la konversacio, li demandis, ĉu li povas duŝi sin antaŭ la enlitiĝo. Mi respondis, ke li faru laŭplaĉe. Dum li estis en la duŝejo, mi senvestiĝis kaj enlitiĝis. Post momento, li frapetis ĉe la pordo de mia dormoĉambro. Mi malfermis vestita per mia noktoĉemizo. Li diris : "Ha, estas lito ankaŭ tie ĉi !" Mi ridis, kaj ne demandis, kion do li imagis.

Sed foje la restado de gasto ne estas komika. Iam strasburga esperantisto telefonis por diri, ke li havas afrikan gaston, sed ke, devante foriri, li serĉas iun por preni lian gaston. Mi akceptis, sed diris, ke post iom da tagoj mi havos alian gaston, al kiu mi promesis mian salonon. La afrikano ne sciis, kiom longe li devos resti, ĉar li atendis plurajn vizojn, kiujn li bezonis por iri al Jugoslavio. La unuan tagon, li rimarkis mian magnetofonon, kaj demandis, ĉu li povas ĝin uzi por registri kasedojn, per kiuj li klarigis al siaj samlandanoj pri sia restado en Eŭropo. Do, mi lasis lin uzi la magnetofonon. La rezulto estis, ke mi mem dum lia tuta restado ne povis aŭskulti kasedojn, ĉar ĉiam la magnetofonon uzis li. Ankaŭ mian telefonon li uzis, li bezonis organizi sian vojaĝon, do li dum tutaj tagoj telefonis al diversaj esperantistoj en diversaj landoj. Iam, kiam mi revenis el la laboro, li diris al li : "Mi havos hodiaŭ gastojn". Temis pri paro, kiu vivas en Svisio. Ili intencis viziti la landon de mia gasto, do li volis doni al ili monon de sia lando, por ke ili donu al li okcidentan monon, kiun li bezonis por sia restado en Eŭropo. Mi ne bone sciis, kiel akcepti tiujn gastojn, kiujn ne mi invitis al mia hejmo. Mi estis bakinta karotkukon, do mi proponis ĝin al la gastoj de mia gasto, kun teo. Ni babilis en la salono. Dum la konversacio, mia gasto diris al siaj gastoj : "Tiu magnetofono estas tute oportuna, mi intencas ĝin preni kun mi al Jugoslavio." Mi tuj diris : "Ne, tion mi ne povas permesi". La viro de la paro ne estis esperantisto, sed la

virino tuj komprenis mian reagon kaj diris : "Ne eblas preni tiun magnetofonon, certe alian vi trovos surloke". Post kelkaj tagoj alvenis mia alia gasto. Mi provis trovi alian gastiganton por la afrikano. Mi telefonis al diversaj strasburgaj esperantistoj, sed neniu povis aŭ volis lin akcepti. Ja nur mi estas sufiĉe idiota por akcepti la gaston de alia esperantisto ! Do mi devis ambaŭ virojn meti en la salonon. Ĝojinde, mia propra gasto ne ofendiĝis pro tio. Finfine la afrikano foriris. Iom poste mi ricevis telefonan fakturon. Kutime, mia telefona fakturo sumas inter 200 kaj 300 frankoj. Sed tiam la poŝto postulis de mi 1100 frankojn. Kion fari ? La gasto estis for, kaj mi ne povis nei, ke la alvokoj venis de mia propra telefono. Do mi pagis la 1100 frankojn.

Antaŭ nelonge, nordafrika esperantisto skribis por demandi, ĉu mi povas lin gastigi. Mi respondis jese. Mi skribis al li, ke li dormos en mia salono, kaj demandis, ĉu lia religio permesas, ke li tagmanĝu kun mi en la kafejo de la universitato. Li respondis jese, kaj petis, ke mi sendu ateston pri gastigado. Mi sendis tiun dokumenton. Tiam mi ricevis de li plurajn longajn leterojn, en kiuj li laŭdis sian grandan francan amikinion, kaj antaŭĝojis, ke ni povos paroli kune, kio, laŭ lia propra opinio, estos valora sperto por li kaj por mi. En la lasta el tiuj laŭdegaj leteroj, li petis, ke mi telefonu al Air-France en lia lando. Mi demandis kial. Mi ricevis respondon, en kiu li grumblas, ke mi ankoraŭ ne rezervis por li la sidlokon en aviadilo. Mi rakontis tion al pluraj kolegoj, ĉiuj miris pri tioma aŭdaco.

Post tiuj spertoj, mi demandas min, ĉu ekzistas evidentajoj en internaciaj rilatoj. Pluraj esperantistoj diris al mi, ke antaŭ ol gastigi iun, oni precizigu la kondiĉojn de la restado. Bone, sed, kiam mi mem gastigis, neniu precizigis al mi, ke mi ne rajtos forpreni la magnetofonon de mia gastiginto. Ĉiuj opiniis, ke tio estas evidentaĵo, kaj nomus ŝtelisto gaston, kiu tion farus. Ankaŭ neniu skribis al mi, ke mi devos mem pagi la vojaĝon. Ĉiuj opiniis, ke tio estas evidentaĵo. Do, kio estas aŭ ne estas evidenta ? Kiel reagus eŭropaj laŭtuloj al letero tia : "jes, vi povos veni, sed nek forprenu la magnetofonon nek atendu, ke mi pagos vian vojaĝon" ? Ĉu ili opinius min freneza ? Kaj

kiel reagis ekstereŭropaj laŭtuloj al tiu rakonto pri miaj misaventuroj ? Ĉu aliaj havis tiajn spertojn ?

KRISTOF' :

Bedaŭrinde, mi ne havas la saman sperton pri gastigado de esperantistoj kiel laŭtulina Jacqueline.

Kial ? Certe pro manko de tempo, konstanta translokiĝo, esperantista izoleco...

Laŭ ĝenerala vidpunkto, la lingvo Esp-o estas neanstataŭebla ilo por okazigi interhomajn kontaktojn. Sed la praktiko montras al mi, ke rektaj kontaktoj ne ĉiam estas facilaj. Male, la spertoj de Jacqueline pravas, ke ili povas esti tedaj.

Ĉu ekzistas solvo ? Certe ne. Mi opinias, ke antaŭ ol eknodi kontaktojn, necesas trovi komunajn gustojn kaj ĝu-aĵojn. Sur tiu tereno, la nova servo de SAT, pri kiu **Laute** jam raportis, povas permesi pli riĉajn kontaktojn. Temas pri nova formo de turismo, en kiu la vojaĝo estas la preteksto al rekta interkonatiĝo dank'al interŝanĝo.

Ne nur Esp-o povas proponi similajn vojaĝ-eblecojn ; certe ekzistas asocioj, kiuj proponas novan vojaĝ-manieron. Sed Esp-o, plifaciligante la senbarilajn kontaktojn, pliriĉigas la interŝanĝaĵojn.

PAKO :

*Tre amuzas la **aventuroj** de Jacqueline, pri kiuj eblas nenia diskuto ; sed la debato de ŝi proponita estas vere interesa.*

*Mi ankoraŭ gastigis neniun ĉe mi, kaj principe mi tion ne faros - se paroli pri nekonata E-isto -, ĉu tial ke E-o kaj ties **interna ideo** ne bone alkroĉiĝis al mia animo, ĉu tial ke mi konsideras mian hejmon kiel neprofanendan sanktejon (ambaŭ eksplikojn mi aŭdis, kaj mi akceptus pliajn). Sed malgraŭ tio mi ne vidas stranga, ke E-isto tion pretas fari. Mi mem, por ekzemplo, neniam akompanas tra mia urbo turistojn, sed tion mi faras plezure kun E-istoj.*

Mi opinias, ke ĉiu homgrupo eta (tia ni konsideru la esperantistaron) havas certan solidaran senton al siaj propraj membroj. Mi supozas, ke kiam la kunligilo de la homgrupo

ununiformigas la vivmanieron de ĝiaj anoj, la kunvivado inter ili estas glata (por ekzemplo, samsektanoj). Sed nia sola kunligilo estas lingvo, do en niaj rilatoj povas okazi io ajn, kvankam kompreneble en esperanto.

GAROLO :

AMUZA 32a ĈENLETERO

... des pli amuza, ke Jacqueline enkondukis la aferon kaj akaparis praktike ĉion dirindan... Mi persone plene komprenas la fakton, ke Jacqueline tute ne akceptis dormi en la sama lito kun la gastoj, ĉar vere malgraŭ la plena intenco pri respekto, pri deco kaj spite al la eventuala, klasika, disiga tabulo inter ambaŭ, la samideanaj langoj (se ne lingvoj) sub la natura premo de glandaj funkciadoj, povus konduki al tro malagrablaj (aŭ agrablaj) okazaĵoj. Konsentite.

Konsentite, ke en tiu stranga popolo, kiu estas la esperantistoj, ankaŭ kaj kiel en ĉiuj medioj vivas profitemuloj kaj parazitaj. Ni ne forgesu, ke Esperanto estas lingvo, komunikilo, ne gastigilo. Mi persone jam vojaĝis en ĉiuj kontinentoj de nia tera globeto, kiam mi estis vere malriĉa kaj kiam mi estis pli monhava ; mia gastigado okazis en hoteloj, kiuj ja ekzistas por ĉi tiu celo... Mi elektis ĉu senstelan hoteleton, ĉu plurstelan, se ne ponton kun mia dormo-sako, laŭ miaj rimedoj. Unue, verdire mi ŝatas mian liberecon, mian individuecon, due mi opinias, ke ankaŭ ĉiu kaj ĉiuj devas havi sian propran sendependecon kaj ne fariĝi parazitaj teduloj. Ankaŭ en tiu aparta kazo ni ne intermiksi la nociojn pri "Solidaro" kaj pri "Almozo".

La kulturaj kontaktoj estas aliaj aferoj kaj mi plene akceptas ilin laŭ normalaj normoj de "Amikeca Reto de SAT", tiu bonega iniciato. Laŭ la retlisto mi estas je n-ro 26. Mi restas je la dispo de ĉiu kaj ĉiuj. Cetere ĝis nun neniun esperantiston aperis, eble pro la situo sub la kaprikorna tropiko... ĉu ne bedaŭrinde ?

Nicole D. :

Gastigado de esperantistoj estas servo sed ankaŭ rimedo por amikaj kulturaj interŝanĝoj. Gastigadon devus profiti ne nur la gastoj sed ankaŭ la gastigantoj, sen-

depende de la geografia situo kaj de la ekonomia nivelo.

Esperantistoj venas el diversaj landoj kaj ankaŭ el diversaj kulturoj. Ili ne estas nesciantaj pri tiuj diversecoj : almenaŭ pere de Esperanto, kiun ili lernis kaj ekzercas, pere de la diversaj amaskomunikiloj (gazetoj, radio, TV...) ili scias iom pri la mondo. Tiuj scioj ne malhelpas misaventurojn inter esperantistoj same kiel inter samlandanoj.

La Pasporta Servo same kiel la Amikeca Reto starigis regulojn por eviti kiel eble plej ofte misuzojn, malfacilaĵojn, por eventuale forpeli senskrupulajn profitemulojn, kiuj vizitas nur E-istojn el turismaj regionoj, kaj kiuj serĉas nur senpagan akceptejon.

Mi mem ne estas tre sperta pri gastigado de E-istoj. Sed mi kelkfoje gastigis esperantistojn kaj estis gastigita. Neniam, bonŝance, mi havis malfacilaĵojn, estis ĉiam tre pozitivaj travivaĵoj, interesaj, amikecplenaj interŝanĝoj.

Por eviti problemojn pli-malpli malagrablajn, seriozajn, necesus ke ĉiuj postulantoj al gastigado nepre proponu sufiĉe frue antaŭe sian viziton, por ke eblu preciza respondo, por ke la gastigontoj povu eventuale rifuzi aŭ sin organizi.

Ĉiam ĉiuj devus senti sin liberaj por akcepti aŭ ne la kondiĉojn. Kiam temas pri neatendita "gasto" nekonata, estas malpli simpla situacio. Laŭ mia opinio, tio ne devus okazi ofte, se tiu ĉi ne estas profitemulo. Tiam se iu ne antaŭvidita gastigado ĝenas onin, tion oni deklaru, tut-simple rifuzu, proponante aliajn solvojn. Sed, se eblas, tamen oni gastigu, precizigante je kiuj kondiĉoj.

Necesas, ke la gasto adaptiĝu al la vivkondiĉoj de la gastiganto por ne esti trudema.

Ambaŭ, gasto kaj gastiganto, povas travivi misaventurojn, tio estas la "risiko", kiam oni akceptas tian servon.

Laŭ momentaj eventoj, sana prudento ebligas al ni reagi, diskuti, informi... Ĉu ne estas unu el la celoj de la internacia lingvo ?

ĴANSEB :

Mi konfesas, ke la temo ne multe inspiras min. Post kelkaj provoj, kiujn mi ne ŝatis, mi konstatas, ke mi malofte spertis pri gastigado de samideanoj.

Kompreneble, la problemoj, kiujn metas Jacqueline, estas gravaj, kaj tuŝas pli fundamentan problemon : kiel akordigi homojn kun malsamaj konceptoj pri la komuna vivo ?

Alia problemo, pli praktika : Se ne ĉio iras glate, kiu devas pagi ? Ĉu la gasto ? (Oni supozas, ke li ne havas monon). Ĉu la gastiganto ? Li ne ŝatos tiun neantaŭviditan elspezon. Ĉu lia ŝtato ? Ŝajnas, ke la atestoj ĝuste tion celas eviti. Ĉu la E-movado ?

Kial ni ne havu asekurojn, kiel la sportaj organizaĵoj, kiuj funkcias aŭtomate, kiam oni aliĝas ? Kiom kostus kiel kroma kotizo tia asekuro ? Eble ni povus tiel konigi la movadon eksteren...

J.G. :

Pro familiaj kialoj mi ĝis nun ne povis aliĝi al la listo de la Pasporta Servo. Mi intencis fari tion ĉi-jare, sed la misaventuroj de Jacqueline devigas min pripensi la problemon por ne renkonti la samajn malfeliĉajn spertojn.

En la junulgasteja movado mi jam spertis la "gastojn", kiuj havas adresaron laŭdire donitan de konata persono, al kiu oni povas fidi. La "gasto" restadas kelkajn tagojn, foje pli, kaj iras viziti alian gaston, al kiu li aŭ ŝi rediros la samon kaj la afero plu daŭras, ĝis kiam iu malkovras la sistemon. Kelkfoje libroj kaj mono estis ŝtelitaj. La movado reagis kontraŭ tiuj "profesiuloj de la gastigado", avertante la estontajn viktimojn per anoncetoj en la gazetoj de la diversaj grupoj : "Malfidu tiun personon, kiu estas nur 'profitemulo' ".

En la E-movado estas tamen iom pli da garantioj, ĉar ĝi estas ne amasa sed elektita medio, sed la spertoj de Jacqueline elmontras, ke la "profitemuloj" povas ekzisti ankaŭ en Esperantujo. Laŭ mi, oni devas trudi du kondiĉojn al la eventualaj gastoj. Unue, averti sufiĉe frue, por ke la gastiganto povu iom informiĝi pri la persono, kiun li devas gastigi. Due, ke la gasto estu vera esperantisto scipovanta la lingvon kaj aktivanta por Esp-o.

Pri la akceptado de gastoj el orienteŭropaj landoj mi scias, ke la afero estas komplika, ke la gastiganto havas respondecojn, sed mi ne bone konas la problemon.

Mi ricevis diversajn petojn, por ke mi gastigu esperantistojn el Bulgario, Pollando. Komence, mi akceptos gekorespondantojn de amiko mia kiel unuan sperton.

Suzanne :

Jam, en L! 65, mi havis la okazon parte klarigi la malfacilaĵojn truditajn al la franca gastiganto. Mi rakontis sperton de iu esperantisto, kies gasto restis pli ol unu monaton ; tia longa restado fariĝis maltrankvila tempo por la gastiganto, pro la koncernaj trudoj pri kiuj informis nin Jacqueline.

Antaŭ 29 jaroj, esperantistino rakontis al mi la malagrablaĵojn, kiujn gasto havigis al sia gastiganto. La gastiginto estas inter la esperantistoj, kiuj tuj emas konsideri la gaston kiel fraton, amikon. Do, amikecan kaj fratecan gastigadon ricevas la gasto. Li, verŝajne, estas unu el la homoj, kiuj lernis E-on pro siaj altaj sentoj. En SAT, mi opinias, ke tiaj homoj estas la plejmulto, konsekvence, ili estas ĝentilaj, afablaj, k.s. Nun precizigo pri la okazintaj faktoj.

Tiu gasto ŝajnis malĝentila homo. Li preskaŭ ne helpis sian gastiganton starigi brullignajn ŝtipojn ; li en la banĉambro malordigis aŭ eĉ malpurigis la lokon. Mi ne forgesis la plej "rimarkindan" : En la salono, sidante sur seĝo, li fekis en la ĉeesto de la familianoj. La edzino de la gastiganto, kiu eble ne estis esperantistino, grumblis (tion oni povas kompreni!) kaj postulis de sia edzo purigi, ordigi la aĉajn farojn de la gasto.

Ĉu antaŭ la veno de la gasto, aŭ dum lia restado, la gastiganto legis en E-revuo atentigon pri tiu homo, mi ne plu memoras, sed mi scias, ke la gastiganto kaj la gasto kune iris al la stacidomo. Ĉu tiu forirtago estis deviga, aŭ libere elektita de la gasto, mi ne plu memoras, sed la gastiganto sciis, ke oni arestos la gaston, ĉar la polico de ties lando petis tion. Kun tremo en la animo la gastiganto faris tion, ĉar li estis fervora e-isto, verŝajne idealisto, kiu konsideras ĉiun esperantiston kvazaŭ homon kun nepre altaj sentoj.

Eble, en la kadro de la Amikeca Reto la etoso estos pli intima, kaj la homoj pli scipovos la lingvon, ĉar ili estos ne kutimaj turistoj, aŭ ili eĉ ne "turismas".

Same kiel J.G., mi preferus gastigi homojn, kiujn mi iom konus, t.e. gekorespondantojn. Plie, mi estus nekonvena gastiganto, ĉar mi loĝas en vilaĝo de montara regiono, 100 kilometrojn for de sufiĉe grava urbo. Mi ne havas aŭton, kiu ebligus al ni viziti naturajn vidindajn lokojn en la proksimeco, tiam, amikeca ligilo estas nepre.

Patriko :

"Kiel bone vivi kaj kiel belas la vivo !"

Vladimir Majakovskij

OKSANA :

Parolu spertintoj

Bedaŭrinde Patriko ne precizigis, kiu ĝoje ekkrias la vortojn de Majakovskij : ĉu gastig-onto, -anto, aŭ -into ? Aŭ ĉu invitito, ricevinta vizojn ? Nu, ne gravas. Ĉiu homo havas almenaŭ foje en la vivo momenton, kiam li/ŝi ekkrias ion similan. Post ampleksa kaj tre detaliĉa priskribo de Jacqueline pri siaj spertoj mi havas malmulton por diri : ĉar mi neniam estis sur la listo de la Pasporta Servo, nek uzis ĝin (krom unu fojon). Mi admiras sociemon kaj aventuremon de Jacqueline - kaj plian fojon veas pri esperantistoj aŭ t.n. esperantistoj (ĉar kiel nomi tiujn, kiuj ne scipovas diri elementajn frazojn en Esp-o, sed ne hontas uzi servojn de esperantistoj ?) Strange, ke necesas diskuti pri elementaj kondutreguloj : ĉu povas esti ia dubo pri tio, ke gasto antaŭ ol telefoni ien (des pli - alilanden!) devas peti de hejmmastrino aŭ ke gasto ne rajtas forpreni magnetofonon de gastiganto ktp. ktp.? Sed - parolu tiu, kiu havas sperton !

Ĉe la broŝurservo :

Bv. la interesatoj noti, ke estas nun elĉerpitaj (kaj ne estos reeldonitaj) jenaj broŝuroj :

Sveda Novelaro

Esperanto en 24 paginas (hispanlingva)

La Adresaro de L! : Pro abundego de la materialo ne eblis enŝovi ĝin en tiun ĉi numeron. Espereble, en la novembran ??

Feliĉoj kaj malfeliĉoj de l'kristanismo
(laŭ kaj el la verko "Mil jaroj de kristana filozofio"
de Evaldo PAULI)

daŭrigo de L! 83

5.

Koncerne la leĝojn de religia kontrolo, la Roma Imperio postulis de ĉiu religio la necesan aprobon, por ke ĝi funkciu. Laŭdire, Tiberio (14-37), posteulo de imperiestro Aŭgusto, pensis eĉ aprobi Jesuon kiel unu el la romanaj dioj. Koncerne la judojn, ili jam detempe estis akceptataj; komence la kristanoj kreskis laŭleĝe, ĉar ili estis konsiderataj kiel unu el la judaj sektoj.

Ordinare, la leĝoj de Romo malpermesis religiojn operaciantajn per sekretaj kultoj kaj magiismo, kaj la kristanoj insistis pri kelkaj radikalecoj, ekzemple, ili estis insiste kontraŭ la kulto al la imperiestroj. Ne ĉio, kion oni asertis pri la martiroj, estas vera, kaj tio, kio estas vera, ne ĉiam povas esti atribuita rekte al la oficiala sinteno de la regnestroj. Foje la samo, kion unuj diras kontraŭ la aliaj, estas renverse vera. La legendo diras, ke la kristana virina filozofo Katarina el Aleksandrio estis mortigita; sed ne estas legendo, ke je la sama tempo la kristanoj de Aleksandrio mortigis la virinan filozofon

Hipacia.

La kristanoj jen estis, jen ne estis persekutataj laŭ la okazintaĵoj kaj regiono. Kun imperiestro Domiciano (81-96) tri dekojn post Nero, okazis la dua konsiderinda persekutado. La situacio mildiĝis sub imperiestro Adriano (117-138). Imperiestro Komodo (180-192) havis kristanan konkubinon nome Marcia, kaj li estis favora al la kristanoj.

Sed ekde Septimo Severo (193-211) la kristanismo suferis vere la persekuton de la oficialaj instancoj, kiel ankaŭ ĉiuj novaj religioj, precipe tiuj venintaj el Oriento, kiuj pro tio estis similaj al la kristanismo mem. La plej sistema persekuto estis tiu de imperiestro Diokleciano (285-305). Konstanteno fariĝis imperiestro en 324; tiam la situacio inversiĝis kontraŭ la paganoj, kiuj jen restas liberaj, jen

persekutataj. Tiu problemo de religia kontrolo laŭ la rajtoj de ĉiuj restis dum multaj jarcentoj, tra la Mezepoko kaj komenciĝinta moderna epoko, senefektiva solvo.

Novaj orientaj kultoj alvenis post la konkero de Persio, ekzemple, la mitraismo kaj la maniĥeismo.

Mitraismo tre disvastiĝis dum la III-a jarcento, precipe pro la movo de soldatoj de regiono en alian. Veninta el Persio, ĝi kreskis tuj en Malgranda Azio. En Romo, imperiestro Aŭreliano (270-275) konstruis templon dediĉitan al Dio Mitra, kies naskiĝfestoj okazis la 25-an de decembro, konata kiel "Naskiĝo de la Nevenkebla Suno"; eble pro tio la kristanoj festas tiutage la naskiĝon de Jesuo. Ankaŭ Konstanteno akceptas tiun kulton al la Suno, tio estas al Mitra (dio de la lumo). La inicaj ritoj, celantaj la purigon kaj la finan savon, influas kristanajn misterojn (aŭ sakramentojn) almenaŭ ekstere. Sammaniere, la koncepto pri Dio kiel lumo havas karakterojn, kiuj povis intermiksiĝi kun la kristana Logoso, precipe pro la prestiĝo akirita de la mitraismo dum la III-a jarcento.

6.

Origeno naskiĝis en Aleksandrio ĉirkaŭ 185. Li verkis multajn librojn, kiujn la kristana fanatikismo forgesis aŭ eĉ detruis, pro doktrinoj poste oficiale konsiderataj herezaj. Li estis kondamnita en la Ekumena Koncilio de Konstantinopolo en 553.

Ĉirkaŭ la jaro 230, la episkopoj de Cezareo kaj Jerusalemo ordinas sacerdoton al Origeno; sed la episkopo malpermesas, ke li instruu en Aleksandrio, kaj per la Sinodo de 231 demetas lin, pro malobeo al la ekleziaj leĝoj (de Aleksandrio) kaj pro herezo.

Bedaŭrinde, la memkastrado de Origeno tumultigis la normalan socian enpostenigon de tiu erudicia kaj kapabla homo.

Jam Jesuo parolis pri eŭnukoj, kiam li promesis premion en la dia regno al tiuj, kiuj kastras sin, lasante ĉion por dediĉi sin nur al tiu entrepreno; sed tio estis interpretita de la plejmulto figure. Tamen, tiuj vortoj de Jesuo instigis al severa ĉasteco kaj foje al fizika. Atenagoro rekomendas

kristanojn al la imperiestro pro ilia moralo. Li diras : "Oni povas renkonti inter ni multajn virojn kaj virinojn, kiuj vivis sen geedziĝi pro la espero esti avantaĝa al Dio. Se persistemo en la virgeco kaj en la libera kastrigo alproksimiĝas al Dio, se la nura penso, la nura deziro de plezuro malproksimiĝas de li, ni evitas pro pli forta motivo la agojn, pri kiuj ni evitas eĉ la pensojn." Justeno ankoraŭ rakontas pri iu kristano de Aleksandrio, kiu petis al la guberniestro de tiu urbo permeson por kastrigi per helpo de iu medicinisto; la guberniestro neis la peton de tiu kristano, kiu poste forlasis la sekssindetenon.

Precipe en Afriko, ĉefe en Kartago, aperas tiuj latinaj verkistoj de la III-a jarcento kaj ĉi tie ili daŭros en la du sekvantaj jarcentoj. Sed kun la invado de la Vandaloj kaj poste de la islamanoj tute malaperas la afrika kristanismo, kaj la latinaj verkistoj estos nur tiuj de Eŭropo.

Tertuliano, fondinto de la latina teologio, naskiĝis en Kartago ĉ. 160 kaj konvertiĝis al kristanismo ĉ. 195. Tamen li restis katoliko nur dek unu jarojn. Post 206 ĝis 212 li tendencas al la sekto de la Montano (al Frigio, Malgranda Azio), kiu predikis la lastan revelacion kaj la tujan finon de la mondo. En 212 li estas definitive montanisto. Fine li kreas propran grupon - la tertulianistojn. Tiuj lastaj havis bazilikon en Kartagon, kiam Aŭgusteno pacigis ilin kun la katolika eklezio.

Tertuliano vivis kiel sankta homo, ĉar laŭ la montanismo oni devus vivi sankte pro la proksima mondfino, kaj prefere ne edziĝi. Eble pro tiu eliro al la montanismo, la oficiala eklezio silentis pri la granda verkaro de Tertuliano, vera kreinto de la latina teologio; nur ekde la Renesanco oni restarigis justecon pri tiu elstara inteligenteco. Tertuliano defendas la kutiman fanatikan vidpunkton de la kristanoj; li skribas kontraŭ tiuj, kiuj neas la neceson defendi la kredon ĝis la morto, kontraŭ la forkuro, kiam okazas la persekuto kaj kontraŭ uzo de mono por aĉeti la bonvolon de magistratoj, ĉar Dio volas aŭ permesas persukuton. Li skribas ankaŭ kontraŭ la Judoj kaj herezuloj.

Tertuliano kredas, ke la vivo komenciĝas per la koncipado, kaj ke ĝi ekzistas ekde ĉi tiu momento kaj loko de l'

animo. La moralo, kiun li prezentas, estas tre severa. Li malpermesas spektaklojn en la cirko, amfiteatro, stadiono, ĉar li juĝas ilin neapartigeblaj de la idolisteco kaj de la malmoraleco. Modesteco pri la vestoj estas rekomendata al ĉiuj. Al virinoj estas malpermesataj ĉiuj specoj de koketeco, farbo de la vestoj kaj de la haŭto. Fraŭlinoj devas uzi vualon sur la stratoj kaj en la preĝejo. La geedziĝo devas esti monogamia kaj nedisigebla.

La ĉi-supra rigora moralo inspiriĝas en apostolo Paŭlo kaj ripetiĝos en Aŭgusteno kaj en preskaŭ ĉiuj mezepokaj teologoj. Li okupiĝis pri la rajto de vivo de la naskiĝontoj; kiam oni akuzis la kristanojn pri infanmurdado, li tuj asertis : "Por ni, vere, konsidere, ke ne estas permesata la mortigo, ne estas laŭleĝe detruita tion, kio estas koncipita en la patrino, dum la sango formas la homan kreitaĵon. Nepermesi la naskiĝon signifas rapidigi la mortigon, kaj ne estas diferenco, se oni forigas la animon jam naskitan, aŭ se oni detruas la animon, kiu estas naskiĝanta. Kio jam estas por ekzisti, tio jam estas homo, kiel la frukto jam estas en la semo".

Laŭ Tertuliano, la neobeo al la natura leĝo estas ago kontraŭ la naturo mem kaj kontraŭ la aŭtoro de la naturo, Dio.

* *

Novaciano (ĉ. 200-258) klopodis elektiĝi papo en 250, sed sensukcese. Tiu fakto kaj lia tre rigora moralo estis motivo de skismo, nome novacianismo, kiu konsistis preskaŭ nur en la kreo de paralela eklezia pastraro; jen la unua granda skismo de la roma katolika eklezio, ĉar ĝi etendiĝis en la tutan imperion, kaj ĝi daŭris almenaŭ du jarcentojn. Novaciano mortis dum la persekuto de imperiestro Valeriano (257-258), laŭ informo de la kristana historiisto Sokrato.

(daŭrigota)

EL LA ESTONA POEZIO

tradukprovo de Johannes Palu

Tallinn

SPLITETO

Kiu kuraĝas foje esperi
ke povas la pasinteco
esti kritikema instruant'?
Tiam eble iu infan' de estonteco
de la peza periodo
estiĝos finigont'?

La estontec' neniel rajtas esti
portebla per misteraj ventoj.

SOMERMEZO

Flirtas papilio
tien-reen
ne tre altflugema
ne aparte flugilhava
nur dekorativa

Gi neniam ploras
kaj neniam ĝi estos
serioze enamiginta
kaj neniam ĝi mortos
je kancero

Ilona Laaman (1934-)=

poetino,
nun en
Svedio

El portebla animo mi sekvas cian flugon,
facilviva animo de somero.

FLUGILOJ

Floroj ne scias sian aromon
kaj maro ne scias siajn ŝipojn
tero kiun ni surpaŝas
ne scias la numeron de miaj ŝuoj
Aromo ne scias sian floron
kaj ŝipoj ne scias sian maron
la numero de miaj ŝuoj
scias absolute nenion

Sed se mi havus flugilojn
ili certe sciis sian ĉielon...

Varlam ŜALAMOV

REMEMOROJ

"Mi naskiĝis la 18an de junio 1907 en Vologda. Mia patro estis pastro, ortodoksa misiisto sur Aleutaj insuloj en Norda Ameriko, reveninta Rusio post la unua rusa revolucio de 1905. Mia patrino estis instruistino.

La Unuan mondmiliton, la revolucion kaj civilan militon mi travivis en Vologda, estante lernanto. En 1920 sur Norda fronto estis mortigita mia frato-ruĝarmeano, la patro blindiĝis, li vivis blinda 13 jarojn kaj mortis en 1933. La patrino mortis en 1934."

tiel komenciĝas "Mallonga vivpriskribo de Varlam Ŝalamov, kompilita de li mem". Varlam Ŝalamov estas vaste konata kiel poeto kaj aŭtoro de "Rakontoj el Kolyma". Apartaj rakontoj estas tradukitaj en Esperanton (vidu LKK-on : n-roj 27, 28, 29). En tiuj rakontoj la aŭtoro priskribis sian propran teruran sperton de malliberulo en sovetia Granda Nordo. Ŝalamov estis arestita (jam la duan fojon) en la tragika jaro 1937 kaj liberiĝis nur post la morto de Stalin. 50-jaraĝa, li revenis Moskvon, kie de tempo al tempo aperadis liaj poemoj.

Varlam Ŝalamov mortis en domo por maljunuloj en 1982. Tiu ĉi rakonto (unu el kvar "Rakontoj pri infanaĝo") troviĝas en libro "Releviĝo de lariko", kiun kompilis amikoj de l'aŭtoro. Ĝi aperis en Parizo en 1985. En nuna epoko de Glasnost (t.e. nekaŝado) la nomo de Varlam Ŝalamov denove aperis sur paĝoj de l'sovetaj revuoj. Tamen multaj liaj rakontoj daŭre restas nekonataj por sovetaj legantoj. Espereble venos iam tempo kiam la rakontoj de Varlam Ŝalamov (aparta libro!) ekzistos ankaŭ en Esperanto. La aŭtoro meritis tion. Cetere unu el "Rakontoj de Kolyma" nomiĝas "Esperanto".

antaŭparolo de la tradukintino, Oksana

SCIURO

Arbaro ĉirkaŭis la urbon, eniris la urbon. Sufiĉis translokiĝi sur najbaran arbon - kaj vi jam estis en la urbo, sur bulvardo, kaj ne en arbaro.

Pinoj kaj abioj, aceroj kaj poploj, ulmoj kaj betuloj - ĉiuj similis - ĉu ili staris ĉe l'arbarkampeto ĉu sur placo "Lukto kontraŭ spekulado", kiel oni ĵus alinomis la bazaran placon de l'urbo.

Kiam la sciuro rigardis el malproksimo la urbon, ŝajnis al ĝi, ke la urbo estas distrancita per verda tranĉilo, per verda radio je duonoj, ke la bulvardo estas verda rivero, en kiu eblas naĝi kaj alnaĝi alian eterne verdan arbaron, similan al tiu, en kiu ĝi vivis. Ke ŝtonoj ne daŭros longe.

Kaj la sciuro decidis.

La sciuro transsaltadis de poplo al poplo, de betulo al betulo - aferece, trankvile. Sed la poploj kaj betuloj ne havis finon, ili gvidis ĝin pli profunden en maldensajn valojn, sur ŝtonajn kampojn, ĉirkaŭitajn de malaltaj arbustoj kaj unuopaj arboj. La branĉoj de l'betuloj estis pli flekseblaj ol tiuj de l'poploj - sed tion la sciuro sciis jam antaŭe.

Baldaŭ la sciuro komprenis, ke la vojo elektita estas erara, ke la arbaro ne densiĝos, sed maldensiĝos. Tamen reveni estis jam malfrue.

Necesis transkuri tiun grizan mortan placon - kaj poste denove estos arbaro.

Sed jam bojis hundoj, preterirantoj levis kapojn.

La pingla arbaro estis sekura - kirasis pinoj, silkis abioj. Susurado de poplaj folioj estis perfida. Betula branĉo tenis pli forte, pli longe, kaj l'elasta korpo de l'besto, balanciĝante, mem difinis limon de branĉostreĉiĝo - la sciuro surpiediĝis, flugis en aero - duonbirdo, duonbesto. La arboj instruis la sciuron ĉieli, flugi. Forlasinte branĉon, disiginte ungojn de ĉiuj kvar piedoj, la sciuro flugis, serĉante apogilon pli firman, pli sekuran ol aero.

La sciuro vere similis birdon, ĝi estis kvazaŭ flava akcipitro, ĉirkaŭfluganta arbaron. Kiel la sciuro enviis akcipitrojn pro ilia transa flugado! Sed la sciuro ne estis birdo. Voĉon de l'tero, graviton de l'tero, sian propran

centpudan* pezon la sciuro sentis ĉiuminute, kiam komencis malfortiĝi arбай branĉmuskoloj kaj la branĉo komencis fleksiĝi sub korpo de l'sciuro. Necesis do reekhavi fortojn, elvoki el korpa interprofundo novajn fortojn por denove salti sur branĉojn, sed ne fali teren kaj neniam plu leviĝi al kronverdaĵoj.

Duonferminte siajn mallarĝajn okulojn, la sciuro saltis, kroĉis sin al branĉoj, balanciĝis, mezuris distancon, ne vidante ke ĝin jam postkuras homoj.

Sur la stratoj de l'urbo jam ekestis homamaso.

Ĝi estis trankvila provinca urbeto, vekiĝanta kun suno, kun kokoj. Rivero tra-ĝi fluis tiom trankvile, ke fojfoje la fluo tute haltis - kaj akvo fluis retren. La urbo havis du amasamuziĝojn. La unua estis incendioj, maltrankviligaj balanoj sur fajrestingista gardoturo, bruo de fajrobrigadaj ĉaroj sur pavimoj, bruo de iliaj ĉevalskipoj - brunaj, grizaj makulitaj - "pomecaj", nigraj - ĉiu fajrobrigado havis alikolorajn ĉevalojn. Partopreno en incendioj estis por kuraĝuloj, sed gapado - por ĉiuj. Edukado de kuraĝo - por ĉiu. Kiu povis marŝi, prenis infanojn, lasis hejme paralizitojn kaj blindulojn, kaj iris "al incendio".

La dua popola spektaklo estis ĉasado de sciuro - la klasika amuziĝo de l'urbanoj.

La urbon trairadis sciuroj, eĉ ofte - sed ĉiam nokte, kiam la urbo dormis.

La tria amuziĝo estis revolucio - en la urbo oni mortigis burĝojn, mortpafadis ostaĝojn, fosis diversajn tranĉeojn, disdonis pafilojn, instruis kaj sendis morti junajn soldatojn. Sed neniu revolucio surmonde ne forigas logon al tradicia popola amuziĝo.

Ĉiu en l'amaso brulis pro deziro esti l'unua, trafi la sciuron per ŝtono, murdi la sciuron. Esti la plej lerta, la plej bona ĵetanto per katapulto - la Biblia ĵetilo - per kiu Goliato celas la flavan korpon de Davido. Goliatoj kuris post la sciuro, fajfis, ululis, puŝis unu l'alian en dezirego murdi. Estis tie kaj kamparano, alveturiginta por vendi en bazaro duonsakon da sekalo kaj esperanta interŝanĝi tiun sekalon kontraŭ piano aŭ spegulo - speguloj dum tiu mortjaro estis malmultekostaj - estis tie ĉefo de l'revolucia komitato de urbaj fervojistaj metiejoj, kiu venis en bazaron por ĉasi spekulantojn, kaj kontisto el "Tutsovetia Konsumunuiĝo", kaj en cara epoko fama ĝardenisto Zujev, kaj ruĝ-

armeana komandanto en frambkolora Gaulliffet-pantalono - ja la fronto troviĝis nur cent verstojn* for de l'urbo.

Virinoj de l'urbo staris ĉe ĝardenetoj antaŭ domoj, ĉe barilpordetoj, elŝovadis sin el fenestroj, krie incitis virinojn, alte tenis infanojn por ke la infanoj bone rigardu la ĉasadon, lernu ĉasi...

Knaboj, al kiuj estis malpermesita memstara sciurpersekutado - ĉar plenkreskuloj sufiĉis - portadis ŝtonojn, bastonojn, por ne ellasi la besteton.

- Prenu, onklo, batu.

Kaj viroj batis, l'amaso muĝis kaj la persekuto daŭris.

Ĉiuj kuris laŭ urbaj bulvaroj post la rufa besteto - ŝvitaj, ruĝmuzelaj, kaptitaj per pasia murdsiŝo, la mastroj de l'urbo.

La sciuro rapidis, ĝi jam delonge komprenis ĉi tiun muĝadon, ĉi tiun pasion.

Necesis malsupreniĝi, grimpi supren, elekti taŭgan branĉon, mezuri distancon, balanciĝi, flugi...

La sciuro rigardis homojn kaj la homoj - la sciuron. La homoj observis ĝian kuron, ĝian flugon, tiu ĉi amaso da spertaj kutimiĝintaj murdistoj.

La pli maljunaj - veteranoj de provincaj bataloj, amuziĝoj, ĉasadoj kaj luktoj - eĉ ne revis postkuri la junajn. Deflanke, sekvante l'amason, spertaj murdistoj donadis necesajn konsilojn, tre saĝajn konsilojn, gravajn konsilojn por tiuj, kiuj povis kuri, kapti, murdi. La maljunaj ne plu povis kuri, ne plu povis kapti la sciuron. Malhelpis anhelado, graso, dikeco. Sed sperton ili havis grandegan kaj ili malavaris konsilojn - de kiu flanko kuri, kiel kaptadi.

L'amaso kreskis - kaj jen la maljunuloj dividis l'amason je taĉmentoj, je armeoj. Duono foriris antaŭen, embuski.

La sciuro ekvidis elkurantajn en interstrato homojn pli frue ol la homoj ekvidis ĝin kaj ĉion komprenis. Necesis malsupri, traduki dek paŝojn, kaj poste denove estos arboj de l'bulvardo, kaj la sciuro ankoraŭ sin montros al tiuj ĉi hundoj, tiuj ĉi herooj.

La sciuro saltis teren, ĵetis sin rekten en l'amason, kvankam renkonten jam flugis ŝtonoj, bastonoj. Kaj trankurinte tra tiuj homoj - "batu ĝin! batu! ne donu spiri!" - la sciuro retrorigardis. La urbo jam preskaŭ atingis ĝin. Ŝtono trafis ĝin en flankon, la sciuro falis, sed tuj eksaltis kaj ĵetis sin antaŭen. La sciuro alkuris azilon kaj grimpis

laŭ trunco kaj saltis sur branĉon, sur branĉon de pino.

- Senmorta, la bestaĉo!

- Nun necesas ĉirkaŭi apud la rivero, ĉe l'travadejo.

Sed ĉirkaŭi ne plu necesis. La sciuro apenaŭ moviĝis sur branĉo, kaj tion oni tuj rimarkis kaj ekmuĝis.

La sciuro balanciĝis sur branĉo, la lastan fojon streĉis la fortojn kaj falis en mezon de l'hurlanta raŭkanta homamaso.

En l'amaso ekestis moviĝo, kvazaŭ en bolanta kaldrono, kaj kiel en kaldrono, forprenita el fajro, tiu moviĝo ĉesis, kaj homoj komencis forlasis la lokon sur herbo, kie kuŝis la sciuro.

L'amaso rapide malkreskis - ja ĉiu bezonis iri laborejen, ĉiu havis ian aferon en la urbo, en la vivo. Sed eĉ ne unu foriris hejmen ne rigardinte mortan sciuron, ne konvinkiĝinte per propraj okuloj ke la ĉaso estis sukcesa, la devo plenumita.

Mi enŝoviĝis tra la malkreskantan amason pli proksimen, ja ankaŭ mi ululis, ankaŭ mi murdis. Mi havis rajton kiel ĉiuj, kiel la tuta urbo, ĉiuj klasoj kaj partioj.

Mi rigardis la flavan korpon de l'sciuro, la sangon koagule sur la lipoj, la muzeleto, l'okulojn trankvile rigardantajn la bluan ĉielon de trankvila nia urbeto.

Elrusigis

Oksana

NOTOJ:

pudo - malnova orientslava mezurunuo de pezo, valoras 16,38 kg. Kompreneble, l'aŭtoro metaforas.

versto - malnova orientslava mezurunuo de longeco, valoras 1067 m.

PANO DE ALIU

Ĝi estis pano de aliu, pano de mia kamarado. La kamarado fidis nur min, li foriris labori en taga alterno, kaj lia pano restis ĉe mi en malgranda rusa ligna **bauleto**. Nun oni ne plu faras similajn bauletojn, sed dum la dudekaj jaroj moskvaj belulinoj paradis kun ili - kun ĉi tiuj sportaj valizetoj el "krokodileska" artefarita ledo. En la bauleto estis pano, la norma kvanto. Se svingi la kesteton enmane, la pano renversiĝus en ĝi. La baulo kuŝis sub mia

SONĜO

Mi sonĝis pri vojeto,
Kie vi sole marŝis.
La birdo blankigita de roso
Vekiĝis je viaj unuaj paŝoj.
En la arbaro verda kaj malseka
Malfermiĝis la buŝo kaj
la okuloj de la aŭroro,
Ĉiuj folioj eklumiĝis,
Vi komencis novan tagon...

KARA AMIKO MIA,

Mi dezirus oferi al vi la freŝecon de narciso
Por mildigi viajn lipojn kiam vi soifas.
Mi dezirus oferi al vi la plej dolĉan mielon
Por kvietigi vian koron kiam vi malsatas.
Mi dezirus oferi al vi ĉielbukedon
Por eterna printempo...

KARA AMIKO MIA,

Mi dezirus pluki la lunradiojn
Por donaci al vi bluan bukedon de espero
Mi dezirus ekbruligi la fajron de ĝojo
Por ke la nokto kraketadu por vi
Je flamoj kaj promesoj...

AL SAMIDEANO,

Se vi spertas ĉagrenon
Se vi ne bone fartas,
Venu loki vian manon
En la mian.
Kunkune,
Ni sekvos la stelon
Al bluaj arbaroj
Kie floriĝas la revoj.

Amkanto dolĉa
Semos ridetojn
En niaj okuloj.
Niaj lipoj estos mutaj
Sed mia rigardo
En vian rigardon
Enversos esperon helan.



VORTOJ
DE MALJUNULO

— — —
valo
— — —

3an de julio

Jen mi denove en Florako, la 86an fojon, se mi ĝuste kalkulas, kun mia edzino, kiun mi ĉi tie ekkonis kiel sam-aĝan kuzinon en 1904. Kaj tien venos ankaŭ ĉi-somere niaj gefiloj, genepoj kaj nia pranepeto.

Florako estas urbeto ne escepte bela, ne escepte pitoreska, sed por mi ĝi estas surtera paradizo, kie mi revivas miajn emociojn de infano kaj adoleskanto. Eble ĝi estos la lasta fojo... Sed for la malgajajn pensojn ! Ni pluku la tagon.

Hieraŭ nin vizitis tri esperantistinoj el Bordojo, venintaj por partopreni en plurtaga marŝado kun prahistoria temo. Ili vidos menhirojn kaj dolmenojn kaj tumulojn, eble grotojn, en kiuj vivis homoj el praeraoj, antikvajn vilaĝetojn kun romanikaj preĝejoj, sub gvidado de S-ro Lagrange, kiu jam multajn jarojn animas la kulturon en kaj ĉirkaŭ Florako. Estas li, kiu sciigis mian adreson al la tri samideaninoj, kutimaj legantinoj de **Laŭte!**. Mi renkontis lin antaŭ tri tagoj, kaj li parolis al mi pri esperanto, tre favore. Kompreneble, li neniam trovis tempon por lerni la lingvon.

Kiom da aprobantoj povus fariĝi efikaj propagandistoj, se ili nur volus akiri la lingvoscion kaj la parolkapablon !

Julio en Ceveno

La vetero estas bela.
Tre bela.

Tro bela : la grundo soifas ĉielan akvon. Dum monatoj jam ne pluvis. Ifoje ŝajne minacas fulmotondro. Ie malproksime aŭdiĝas gruntetoj. Sed seka vento dispelas la nubojn, kaj ree brilas varma suno. La agrokulturistoj vee gvatas la daŭre serenon ĉielon.

Tamen printempo kaj komenciĝanta suno estis frukto-donaj. En mia ĝardeno estis multegaj ĉerizoj, kaj nun multegaj framboj. La pirarboj portas sian pezon da maturiĝontaj fruktoj. Sed la razeno sekiĝas kaj flaviĝas, kaj la arta akvumado estas ridinde nesufiĉa.

La nivelo de la rivero estas ankoraŭ sufiĉe alta. En ĝi ludas gebangastoj. Ĉu mi kuraĝos kuniĝi al ili ? Mi ankoraŭ hezitas pro artrozaj doloroj : la aĝo sin trude memorigas. Ankaŭ en marŝado : ofte doloroj en la kruroj aŭ kramfoj min haltigas, kaj mi rapide laciĝas. Ĉiusomere unu plia jaro sentigas sian pezon.

Nu, ĉu plendi, kiam oni plu vivas en sia 90-a jaro ? Prefere ĝoji pro la memoro pri sia juneca tempo ; kaj pro tio, ke longa vivo ebligas kunestadon kun junaj gene-
poj kaj eta pranepo, kiu gaje ludas en la ĝardeno. Dum ni kliniĝas al baldaŭa morto, la vivo pludauras en niaj ge-
idoj.

Julio en Florako (sekvo)

La 10-an de julio - Nelonge daŭris mia hezitado, tiel forta estas la logo de la rivero : hieraŭ estis varme, mi ne plu rezistis. La kontakto kun la malvarma akvo estis agrabla, kiel ĉiam antaŭe, sed la naĝadon mi trovis pli laciga. Ĉiu nova jaro sentigas sian pezon.

Tamen mi ne bedaŭras mian hieraŭan decidon, ĉar hodiaŭ pluvas, do mi rezignos pri riverbano. Mi esperas, ke pluvos sufiĉe por utile akvumi la tro sekan grundon, antaŭ ol rebrilos la suno : tiel reverdiĝos la flaviĝinta herbo, kaj la rozujoj, kiuj finis sian unuan floradon, refloros. La pluvo, kiu en la urboj estas nur malagrabra kaj malŝatinda, povas esti tre dezirata de kamparanoj. Ne de feriantoj : ĉio estas relativa, nenio kontentigas ĉiujn.

Feliĉe la tri esperantistinoj, kiuj vizitis min lastan lundon, estis favorataj de bela vetero dum sia plurtaga ekskurso tra la ebenmonto kun prahistoriaj monumentoj.

Ilia marŝado estis finiĝonta sabaton vespere, kaj ni esperis revidi ilin, sed verŝajne ili alvenis tro malfrue, kaj ne disponis tempon antaŭ sia forveturo. Dum la mallonga horo, kiun ili pasigis ĉi tie ni trovis ilin tre simpatiaj. Sed ĉu samideanoj povus esti nesimpatiaj ?

Survoje al fino

Aŭgusto en Florako. De post mia ĉi-jara alveno pasis tuta monato. Tuta monato somera, belvetera. Kaj nur sesfoje mi min banis en la rivero, kaj nur unufoje mi grimpis sur la 400 metrojn alta montdeklivo, kiun mi bone konas kaj nur ĝis la mezo. Naĝante aŭ marŝante, mi tre baldaŭ sentas miajn krurojn pezaj, la muskolojn de miaj brakoj kaj de mia tuta korpo rigidaj kaj lacegaj. Mi ŝvitas, mi anhelas, mia koro batas maltrankvile. Meze de mia 90a jaro, mi portas la pezon de tiuj 90 jaroj.

Vide al la proksima fino, mi retrorigardas al mia vivo, tro longa kaj nesufiĉe plena. Kiom da ebloj preterlasitaj, kiom da faroj neplenumitaj ! Korpe kaj mense, kiom da efektivigoj estus sukcesinta pli agema, pli volforta homo !

Renkontante gejunulojn plenajn je printempa ardo, mi volus diri al ili : Vivu vian vivon plene kaj intense ! Kaptu ĉiun okazon, forte premu ĝin en viaj brakoj ! Agu senkalkule, sindoneme al aferoj indaj je grandaj oferoj ! Sekvu laŭeble la vojon ekzemplan de nia Majstro Zamenhof, de nia kamarado Lanti, kiuj sin donis malavare al sia homarana idealo. Kiam venos por vi la tempo de la bilanco, farante la konton tiom de la neeviteble fiaskaj provoj, kiom de la trafitaj celoj, vi povos diri kiel Sillero :

"Mi estas ĝuinta la teran feliĉon :
Mi estas vivinta kaj aminta."

Ankoraŭ unu heroaĵo de religia fanatiko

La legado de gazetraportoj pri diversaj okazaĵoj estas ofte instrua. Jen estas unu freŝdata specimeno.

Iam du fratinoj el muzulmana soveta respubliko edziĝis al du rusaj, eble kristanaj, eble (eĉ pli grave) ateistaj. Ili sekvis la edzojn al 500-kilometra distanco en kolĥozon. Tie la du paroj vivis jam plurajn jarojn, trankvile, kun siaj infanoj. Sed la fratoj de la du virinoj rigardis tion kiel krimon kontraŭ la religio de la Dio unika, pardonema kaj bonkora, kaj de Lia Profeto, kaj decidis puni ĝin. Ili do iris al la kolĥozo, serĉis kaj trovis la kulpajn parojn, murdis la du bofratojn, unu el la fratinoj kaj unu infanon, vundis la duan fratinton kaj plurajn infanojn, kaj kredeble sin gloris pri tiu heroa faro, kiu certigos al ili favoran akcepton en la Paradizo.

Kio iam liberigos la homaron el la religia fanatikismo?

Al la legantoj de mia broŝuro "... EL LA KARA INFAN-
ECO" (KI), dua eldono 1983 :

En paĝo 33, post la 18a linio, mankas vortoj, sen kiuj estas miskompreno. Anstataŭ : de la lernejo ĝis la tria etaĝo.,

devas esti :

de la lernejo ĝis la familia domo, kaj li gajnis. Alian fojon la sentima bubo grimpis sur la fasado laŭlonge de la pluvtubo ĝis la tria etaĝo.

VALO

Vojtrafiko kaj stulta akcidento

Tra Florako kuras du paralelaj vojoj, nordsude direktitaj, sur kiuj en aŭgusto estas densa trafiko de aŭtoj kaj motorcikloj. Iuj turiste vizitas la montaron, aliaj urĝas al Mediteraneo. Trafiko danĝera por piedirantoj. Tion mi sciis. Tion mi spertis.

Kutime mi trairis la avenumon tre singardeme, atente observante maldekstren kaj dekstren. Sed tiun 9an de aŭgusto, mi kiel stultegulo trairis senatente, senzorge... kaj

mi renkontis aŭton.

Ĝi trafis min je kokso, kaj ĵetfaligis sur la ŝoseon. Konsekvence : frakturo, ne de femurosto, sed de tiu iliaĵo, en kies konkavo artikiĝas la femurosta kapo.

Mi kuŝas nun surdorse, senmove, senpove. Ĝis kiam ? Ĉu kvar semajnoj, ĉu tri monatoj ? Mi ne scias. Sed mi scias, ke la koksartiko ne retrovos sian elastecon, kaj ne refunkcios glate.

Adiaŭ riverbanoj, adiaŭ montgrimpoj ! Kiam oni tiel kretene kondukis, oni devas akcepti la sekvojn, rezigni pri pluraj aferoj, kaj rezignacie konsenti pri oferoj, malbenante nur nian stultecon. Venta kapo de maljunulo ! Besto senprudenta ! Eminentanta sentaŭgulo !

En la daŭro de unu sekundo kvazaŭ pasis pluraj jaroj da plimaljuniĝo. Mi estis ne tute 90-jara, nun mi sentas min apenaŭ ne centjara.

De nun miaj vortoj fariĝas vortoj de maljunegulo.

Tamen ne maltrankvilu miaj geamikoj. Ŝajne ankoraŭ ne venis la horo...

Du vizitoj

Ĉe mia lito de sufero, sur kiu mi kuŝas senmove, du sinsekvaj vizitoj alportis al mi ĝojon kaj kuraĝon.

Unue venis S-ino Andrea Gaussen, juna emerita instruistino pri franca lingvo kaj beletro, freŝe bakita esperantistino. En malpli ol du jaroj ŝi akiris fluan paroladon. Ŝi korespondas kun pluraj eminentuloj kaj kun nia bonega propagandisto Kdo Henriko Masson. Sed ŝia aktiveco ne limiĝas sur intelekta kampo. Ŝi multe moviĝas : vojaĝoj en eksterlando, kie ŝi renkontas multajn geesperantistojn; piedaj ekskursoj tra montaro, kie ŝi gvidas alilandajn gesamideanojn. Okaze de la lasta el tiuj ekskursoj ŝi renkontis la prezidanton de la Nacia Parko de Cevenoj, al kiu ŝi proponis publikigi esperantan tradukon de la gvidlibreto pri tiu Parko. La prezidanto entuziasme aprobis.

Lastan semajnon ŝi donis sensacian intervjuon al la regiona gazeto **Midi Libre**. Tuj ŝi ricevis multe da telefonaj

informpetoj. Tiel ŝajnas, ke ŝia efika agado venas en favoraj cirkonstancoj.

La dua estis mia pranepeto Francisko, la 32-monata adorinda blonduleto. Li estis tre interesita de la kineziterapia aparato. Revenante la morgaŭon, kun alte levita kapo kaj naiva rigardo, li diris: "Mi venas vidi, ĉu tiu kruro estas riparita." Mi klarigis al li, ke ne tiel rapide ĝi povas ripariĝi, ke necesas tempo kaj pacienco. "L'espero, l'obstino kaj la pacienco..." Li aŭskultis kun granda atento, kaj ŝajne komprenis.

Tiuj du vizitoj armis mian optimismon kaj havigis al mi du grandajn esperojn: pri la estonto de nia afero, kaj pri tiu nova generacio, kiu eble atingos nian celon, aŭ almenaŭ antaŭenpelos la efektivigon de nia revo. "La bela songo de l'homaro" jam ne estas ia mistika vizio. Jam nun la daŭra progreso de la teknikoj ebligas al ni skizi la konturojn de konkreta realigado. Fariĝinte plenkreskaj, niaj pranepetoj mastros la novajn teknikojn, kaj scipovos ilin utiligi por akceli la ekregon de nia idealo.

Tiel maljunulo revas, fronte al la arde vigla fervoro de pli juna aktivulino kaj al la blonda kapo de homideto. Kaj en lia koro renaskiĝas esperoj.

Akcidento (sekvo)

6-an de septembro.

Jam pasis kvar semajnoj. La semajnoj ŝajnas mallongaj, sed la tagoj estas longaj. Ifoje min vizitas insida penso: Kiel komforte estus lasi sin luli kaj endormigi de pigra etoso, kiel agrable senti sin glite sinki en neeston, en nenion...

Sed la kineta-terapeŭtino ne aŭdas per sama orelo. Tiu ĉarma juna virino, tiel energia kaj refleksebla kiel afabla, ne lasas min moligi. Ŝi ĝentile skuas min, kaj trudas al penigaj ekzercoj sendube tre necesaj. Kaj mi volonte obeas al ŝia milda aŭtoritato. Mi ne allasas min al la loga kanto de la sirenoj, mi reagas.

Kiel diris Viktoro Hugo:

La vivantoj estas luktantoj. Estas tiuj,

Kies animon kaj frunton plenigas firma celkonscio,
Kiu de sindon' alta algrimpos l'akran suplon...

Je mia modesta skalo ne temas pri firma celkonscio nek pri alta sindono, sed je mia nivelo, ankaŭ mi estas luktanto. Kaj mi esperas tiel lukti, kiom eble, ĝis la ĉia-okaze baldaŭa fino.

Hodiaŭ mi skribas sidante sur fotelo, kio signifas novan etapon al resaniĝo. Mi kredas, ke la vojo estos ankoraŭ longa, sed ĉiu nova paŝo estas kuraĝiga.

Kaj nun ?

Dum tuta monato mi parolis nur pri mi kaj pri miaj mizeretoj de okaza vundito. Kiel ajn interesa estas mia eta persono, estas tempe nun ektorni mian rigardon eksteren. Dum tiu monato kiel antaŭe, la tero daŭrigis sian duoblan rotaciadon, kaj la homaro sian pli-malpli laman ekzistadon. La homoj plu plimultiĝas malgraŭ masakroj, katastrofoj kaj malsato, precipe tiuj maljunuloj, kiuj pli kaj pli pezas sur la ŝultroj de la junaj kaj mezaĝaj aktivaj generacioj.

Problemo. Kiel solvi ĝin ?

Ĉu limigi la naskadon? Sed tio estas flanka respondo: ja ne estas tro da junaj, sed tro da maljunaj.

Ĉu faligi la maljunulojn de sur kokosarboj, kiel en iuj afrikaj triboj? Ĉu forlasi ilin por natura morto sur glacia dezerto, kiel ĉe iuj eskimoj? Ĉu, pli konforme al nia rafinita civilizacio, injekti al ili mildan venenon, kiu mortigas sendolore ?

Ĉu, pli humane, nur devigi ilin al plua laboro trans la 60a jaro, post longa penado profite al ekspluatistoj - dum tiom da junuloj vane serĉas dungon kaj restas senlaboraj ?

Nur senelirejoj prezentiĝas antaŭ ni, almenaŭ tiel longe, kiel oni serĉados punktajn rimedojn al apartaj situacioj. Ja la tuta sistemo bezonas esti entute repensita kaj reviziita. Ne per detalaj reformetoj, sed per fundamenta revolucio. Post 200 jaroj la politikaj akiroj de la burĝa revolucio ne plu glate funkcias. Same fiaskis la brilaj

efektivigoj de la ekonomia kaj industria revolucio en ĝiaj sinsekvaj formoj : vaporo, elektro, elektroniko, robotiko, informadiko. Tiel la okcidenta "liberala" kapitalismo kiel la orienta "socialista" popoldemokratio ne kapablas elturniĝi. Oni venenas, steriligas, mortigas la teron, la maron, la aeron, oni endanĝerigas la homaron kaj la tutan planedon vivon, kaj la ŝtalaj reguloj de la konsumsocio ne ebligas elsaviĝon el la infera cirklo. Dank'al scienco kaj tekniko oni fotografas de proksime Neptunon kaj Uranuson, oni konkrete preparas viziton de teranoj al Marso, (kaj mi koncedas, ke tio estas aŭ iam estos tre utila); sed oni ne scipovas forigi la minacon pri malsatmorto, kiu pezas sur milionoj da homoj...

Ĉu malsaneca pesimismo? Ĉu sobra, racia, klarvida perspektivo? Provu pripensi ĉiu, kiu ne havas kapeton de pasero !

Pri termika poluado Ni re kaj ree frapu sur la najlokapon

Mi insistas pri la konsekvenco de la termika poluado, kiu eble minacas la teron, jam en la venonta jarcento, pri geologiskala kataklismo.


Iuj respondas : via pesimismo estas troa, kaj ne plene pravigita. Ne estas tute certe, ke tio okazos. Cetere, la demando estas pridiskutata inter kompetentuloj, ĉu por ĉu kontraŭ.

Sed :

1. La poluado termika kreskas laŭ spirala akcelo, kaj tiu-direkta procezo povos daŭri longe.
2. Ĝi povas iam atingi punkton de neinvertigblo, tiam ĉia homa interveno venus tro malfrue por povi bremsi la procezon.

Mi ne pretendas alporti solvon al la problemo, se problemo estas, nek respondi al la demando, ĉu vere estas aŭ ne estas problemo. Mi volas nur alkroĉi la alarmsignalon.

N.d.l.r. : En plej freŝdata letero nia amiko Valo skribis ke iom post iom lia stato pliboniĝas. Plej varmkore ni deziras al li plenan retrovon de lia korpa viglo. Ĉiu leganto povas ja plu konstati la spiritan.



ROBERTO :

En L! 82 mi tralegis strangan artikolon de MANCEAU; skribaĵon de esperantisto, kiu montras ne nur genocidan sed rasistan spiriton. Spirito uzebla por sklavigi homojn per manko de salajroj kaj socialaj laborgarantioj. Tiu antikva, militista spirito ne kongruas kun tiu de nia Esperantio. Vi eraris lerninte E-on, aŭ vi preparas vian polican metion por pafi nome de E. La pacifika maro enhavas proksimume la saman rason, eĉ se devene J.M. Tŝibau posedis japanan sangon, - ne gravas. Vi, certe, ne kapablas pruvi vian prarasan devenon. (Vi uzas tro facilajn argumentojn). Kanakoj ekloĝis sur tiuj insuloj antaŭ la blankuloj, ili absolute rajtas vivteni sin kiel ili deziras, eĉ se ili ne akceptas nian blankan "civilizacion". (Parte L. Angevin respondis al vi). Ne FORGESU, ke niaj blankuloj invadis ilin. Ne konsideru vin kiel konkeriston, vi estas nur Don Kiĥoto. Ne konfuzu Kanakojn kun Araboj, kiuj libere venas en Eŭropon kaj postulas iom tro. Se Kanakoj envias kaj deziras nian vivmanieron, ni mem Francoj kulpas, ĉar, se ni ne estus irintaj sur tiujn insulojn, ni ne provokus ilin, tiel ili vivus "sovaĝe" sen la grandega dio : PROFITO. Tiel mi respondis ankaŭ al Aunis.

Marcelo LEEREVELD :

ANKORAŬ PRI NOVKALEDONIO

Kvankam pasiginte ok semajnojn en Novkaledonio kaj ĉar jam leginte plurajn interesajn artikolojn en "Laŭte" pri tiu lando, mi ŝatas mallonge trakti nur du ĝeneralajn problemojn ŝvebantajn en la diskutoj :

- 1) Dequaire pravas, ke, en la plej multaj kazoj, malkolon...

iĝintaj landoj fartas pli malbone ol antaŭe : ili ĝenerale havas pli kruelan aŭ almenaŭ pli subpremistan registaron; ili malriĉiĝas pro financa prunteprenado; iliaj popoloj devas sen sufiĉa kompensado laboregi por la novaj rapide riĉiĝantaj mastroj sametnaj; la materia scienca progreso malestas escepte de (ofte senutilaj aŭ venenigaj) varoj, kiujn la potencaj kompanioj sennaciecaj deziras vendi al la malriĉaj landoj, ne povante senigi sin je tiuj varoj en la industrie pli progresintaj landoj. Demandu al ordinaraj maljunaj indonezianoj : se ili kuraĝas (kaj kelkaj -as) diri al vi sian penson, ili opinias, ke ili fartis pli bone kaj pli libere en la nederlanda kolonia epoko. Do, laŭ klasbataleca vidpunkto, ne estas diferenco inter la kolonia kaj la propra jugoj. La impulsoj por malkoloniigado estas rasa, religia, lingva aŭ kultura malsuperec-sento (kaj kelkfoje -premo), kaŭzata de alipopola (koloniista) potenco. Laŭ mi, por anarĥiisto aŭ por komunisto, sendependiĝo de kolonioj aŭ de malplimultipopoloj ne valoras la penon, se tia batalo ne ligiĝas al batalado kaj solidareco kun la subprematoj kaj ekspluatatoj en la kolonianta lando, kaj inverse. En tia batalo, la celo estu liberiĝo el sub ĉiaj mastroj. Aliflanke, ĉiuj klopodoj sin mem organizi estas parteto de klasbatalado kaj helpas al la liberiĝema mensostato de la popoloj, tiel konsciiĝantaj pri memorganizado. En tia senco, malkoloniigado, same kiel bataloj kontraŭ poluado kaj arbarmurdado povas alproksimigi kreiĝon de libereca kaj egaleca socio.

2) Manceau opinias, ke la kanakoj devas adaptiĝi al nia eŭropeca civilizacio, ĉar "la ŝtonepoko kaj la 20-a jarcento ne bone povas kunekzisti". Laŭ mi, tio tute ne estas problemo, ĉar la ŝtonepoko kaj nia plastepoko kapablas tre bone kunekzisti, kaj mi konsilus, kontraŭe, al la kanakoj, ke ili faru, kion ili volas, eble uzante el ambaŭ kulturoj la plej dezirindajn ecojn. Krome ni, eŭropanoj, jam mem klare pruvis, ke civilizacioj diversepokaj kunekzistas en nia propra medio kaj eĉ en individuoj : nia scienca progresego edziĝadas kun niaj ŝtonepokaj ordo socio kaj mistiko religia, kaj multegas la homoj, kiuj en flugmaŝino kredas samtempe je dio kaj je la piloto. Kaj finfine, tio estas nur speguliĝo de nia nunepoka cerbformiĝo : la sciencema kortekso ankoraŭ tro regatas de la primitivaj pli malaltaj cerbotavoloj.

OKSANA :

KONSTERNO

Konsternis min la letero de Bernard Aunis en L! 83. Ne, mi ne prezentos tuj liston de malkoloniendaj landoj, kiujn Aunis postulas de PK de SAT. Mi prenis la plumon en la manojn, ĉar B. Aunis parolas pri artikoloj en "S-ulo", kies aŭtoroj "**ploradis pri la sorto de la kompatindaj tataroj**". Ŝokas min la cinika tono, kiun uzas B. Aunis (versajne li celis humuran priskribon, sed rezultis io tute alia). Jam la kvaran jaron mi atente legas "Sennaciulon" kaj mem verkis por ĝi multajn artikolojn sub la plumnomo Orest Samijlenko (pro la ŝanĝiĝintaj kondiĉoj en Sovetio mi ne plu vidas neceson uzi ĝin). En tiuj artikoloj mi pledis ankaŭ por la krimeaj tataroj. Eble iun artikolon en "S-ulo" mi preteratentis. Do, s-ro Aunis estu afabla indiki al mi numeron de "S-ulo", titolon de artikolo, kie li legis pri tio ke "**murdadoj de la 13-a jarcento estas aprobindaj**". Laŭ mi, temas nure pri la fantazio de B. Aunis, kaj - krome - pri la kompleta nekompreneo de la problemo.

Jes, s-ro B. Aunis, la deporto de la krimeaj tataroj el Krimeo la 18-an de majo 1944 estas **krimo**, kiun ĉiu normala homo kvalifikas kiel krimon kontraŭ homaro (same kiel judan genocidon dum la Dua mondmilito aŭ - pli frue - genocidon de la ukraina nacio en 1933 - per artefarita malsatigo). Ŝajnas al mi ke B. Aunis simple ne imagas pri kio li parolas! Dum unu tago, la 18-an de majo, 1944, dum daŭris la milito, dum la Sovetia armeo ricevis jam gravajn venkojn (konsideru ankaŭ tion : en venkanta Ruĝa armeo servis ankaŭ krimeaj tataroj, ne nur rusoj, kiel tion ŝatas ripeti miopaj okcidentanoj) la TUTA krime-tatara popolo, sen rigardo je aĝo, sekso, sanstato ktp., estis metita en brutvagonarojn kaj deportita en Siberion kaj Mezazion. Kialo? Ĉar dum la nazia okupado de Krimeo troviĝis inter tataroj kunlaborantoj de nazioj. Tio sufiĉis por ke Stalin ordonu deportadon de la krimeaj tataroj (kaj ankaŭ 6 aliaj nacioj : ĉeĉenoj, inguŝoj, karaĉaĵoj, kalmukoj, balkaroj, turkoj-mesĥetoj). Eble B. Aunis supozas ke sovetiaj brutvagonaroj estis pli komfortaj ol

tiuj, kiuj veturigis judojn en Aŭsvic? Sciu ke dum tiu malhumana deportado pereis 46 procentoj de deportitoj. Kaj bonvolu respondi al mi : kiel vi nomus tiajn agojn? Krome : se la fakto, ke troviĝis inter la krimeaj tataroj kunlaborantoj de nazioj, estas - laŭ vi - sufiĉa por tiel agi, estu logika ĝis la fino : se jes, necesus deporti la tutan francan popolon (ĉar kvante tamen estis pli da francoj-kunlaborantoj ol tataroj-kunlaborantoj!) kun via familio inkluzive (eĉ se vi opinias vin "sennaciulo", sufiĉis ja en Krimeo : "tataro" en pasporto - en brutvagonaron lin aŭ ŝin!). Mi ne volas suspekti vin, ke vi aprobas krimojn de Stalin. Laŭ mi kulpas oprimado - tial facilas al vi leĝeranime ŝercadi kaj mokadi, vagante tra historio, saltante trans jarcentojn. Memoru ke ni vivas en la dudeka jarcento, ĉiuj nacioj havas samajn rajtojn aŭ ne ? Se ne - kial? Kaj ĉu tia stato estas akceptebla kaj tolerebla? Kial la krimeaj tataroj, post tiom da suferoj, devas daŭre troviĝi en ekzilo, kiel ili ne havas rajton loĝi tie, kie ili volas (ja havas s-ro B. Aunis rajton ekloĝi en Francio kie ajn li volas, aŭ - laŭdezire - en ajna alia lando de Eŭropo aŭ eĉ en alia kontinento!) La Deklaracio de homaj rajtoj estas por ĉiuj nacioj, ne nur por francoj, ĝuantaj sian "sennaciismon", ĉar ili havas ĉiujn kondiĉojn por libere vivi. La krimeaj tataroj devas havi samajn rajtojn, kiel francoj : ĉu temas pri ebleco lerni sian gepatran lingvon, ĉu pri eblecoj eldoni gazetojn kaj revuojn en sia gepatra lingvo, ĉu pri eblecoj praktiki sian religion ktp.

Ĉu krom moko kaj historiaj spekulacioj sennaciistoj havas nenion alian por plimulto da nacioj en la mondo ? Jes, ankaŭ belajn vortojn pri "estonta feliĉa - ĉar sennacia - homaro"... Sed la realan vivon, realajn problemojn ili ne volas vidi. Kompreneble, ne sufiĉas nur "ploradi". Ankaŭ por la krimeaj tataroj kun nunaj ŝanĝoj en Sovetio venis espero. Subtenas ilian lukton multaj neŝtataj organizaĵoj. Ekzemple, Ukraina Helsinka Unuiĝo, luktanta por la estimo de homaj rajtoj en Ukrainio, subtenas lukton de krimeaj tataroj kaj en siaj programaj dokumentoj agnoskas ilian rajton je restarigo de Krime-tatara aŭtonoma respubliko. Laŭ mi tiaj paŝoj multe helpas al firmigo de interpopola amikeco. Amikeco, baziĝanta sur reciproka estimo, kun akcepto de diferencoj kaj ilia tolero. Jes, historio

plenas per sangaj invadhistorioj, sed ĝi havas ankaŭ aliajn paĝojn. Ne per ignoro kaj moko oni konstruas, sed per profunda konatiĝo kun problemoj de aliaj nacioj kaj subteno de iliaj justaj postuloj.

Oksana

P.S. Mi tiom alkitimiĝis al la plumnomo **Oksana**, ke mi preferas konservi ĝin por "Laŭte!". Mia plena adreso estas: Olga Kerzjuk, 85 Point Royal, Bracknell, RG12 4HL, G.B.

Gilbert R. LEDON :

Kiam ĉiuj pravas :

PRETER LA FAKTOJ KAJ CENZURO EN S.A.T.

Mi, kun iom da ĉagreno, akompanas la "Dosieron J. Deker" pri Nov-Kaledonio. Mia intereso ekzistas pro diversaj motivoj. Mi sekvas la evoluon de la Tria Mondo kun la postlasitaĵoj de koloniismo - Mi mem same kiel J. Deker "ekziliĝis de mia kara patrujo" (mi diras tion por la multaj naciistoj, internaciistoj kaj laste transnaciistoj de SAT!). Feliĉe, same Deker kiel mi havas firmas objektivan bazon por nin konsideri sennaciistoj... almenaŭ multe pli sennaciecaj ol la lastatempaj SAT-anoj de Eŭropo kaj Francio aparte. Ni havis oportunon travivi surloke la postkoloniismon kio sendube permesas, ke ni prezentu faktojn, kiuj preterpasas la simplajn starpunktojn de ideologio, eĉ se temas pri tiu de SAT, kie la "tezoj" estas pli valoraj ol la "faktoj".

Kiel mi diras en ĉi tiu titolo, ĉiuj pravas. Pravas SAT kiam ĝi diras ke ĉiu popolo, nacio aŭ ŝtato devas emancipiĝi kaj forigi la subpremojn el koloniisma karaktero (kaj mi aldonas: ĉiujn aliajn premojn). Pravas la artikolo (kvankam ja malbona): "Lasu ilin vivi pace" aperinta en S-ulo aprilo 1985, pravas Bernard Aunis kiam en S-ulo junio/85 li opinias ke la ĉi citita artikolo estas ekvivalenta al "Lasu ilin morti pace". Tute prave, kaj vere objektive. J. Deker tion montras en sia bona artikolo "La dramo de Nova Kaledonio", kiu vere estus meritinta rebati la tradukaĵojn de la "redakcio" el iu Alain Stierne. Ne estas dubo, en tiu aparta kazo, ke kondamno al la nuna formo de naciismo kun koloniismo, aŭtomate kondukas al subteno de alia

ankoraŭ pli detrua formo de naciismo. La ekzemploj de la lastaj jardekoj bedaŭrinde montras kiom danĝeraj estas tiuj idiotaj novaj naciismoj en la tuta Tria Mondo aparte. Ja ne temas pri genta suvereneco sed pri politikaj manipuladoj. Resume mi sincere opinias ke la SAT-cenzuro, ne estus devinta agi en tiu specifa okazo... supozante ke cenzuro devas ekzisti en SAT, pri kio mi cetere tute ne povas konsenti.

Cenzurado en SAT.

Pri cenzuro la SAT-anoj restu trankvilaj, la redakta komitato konsistas nur el 6 membroj... kiuj evidente ne plene akordiĝas. Ekzemple el la paĝo 111 de S-ulo n-ro 1001 citita de Deker, redaktoro Barkoviĉ diras: "Kaj ni estas kontraŭ cenzuro, kiel ĉiuj scias". Iom pli malsupre, laŭdire nome de la redakta komitato kaj PK Peyraut asertas: "kaj mi povas diri, ke cenzuro ekzistas en SAT". Ĉi tiu frazero ne estas erara, ne forestas la "nego" inter "cenzuro" kaj "ekzistas". Mi persone estis plurfoje "cenzurita" de K-do Ivo Peyraut, la nuntempa cenzuristo de SAT. Nu, karaj SAT-anoj tio ne estas tre grava en tiom malgrava asocio kiel nia. Tamen oni devas bedaŭri, ke tio okazas ankaŭ en SAT... ĉar la SAT-principoj kiuj strebas al la memstareco de ĉiu individuo devus lasi la cenzuradon, t.e. taksadon de skribaĵo por akcepto kaj aprobo, aŭ por rifuzo, refuto, al la legantoj mem... aŭ ĉu la SAT-anoj ankaŭ havas tiom fragilajn mensojn, ke oni devas manipuli, kondiĉigi ilin? Ĉu tio ne estas kontraŭ la SAT-prncipoj?

Malakcepto de artikolo sen intereso, malbone verkita kun lingvaj eraroj, aŭ sen bazo ktp. sendube estas "rajto" de redaktoro, kiu devas zorgi pri la "kvalito" de revuo aŭ organo, sed ideologia cenzurado je na povas kongrui kun la SAT-idealo. Mi kredas, ke ĉiuj sinceraj SAT-anoj solidare akceptos tiun fakton kun Deker kaj mi mem.

La kovardaj ekskoloniistoj.

Sendube Ivo Peyraut estis iom nervoza kiam li skribis (ja cinike) ke la "mizero ne estas Nia problemo". Bedaŭrinde la problemo de la Tria Mondo (plejparte ekskolonioj) venis de la "unua Mondo" de tiu nomita "evoluinta mondo" kiu koloniis la "mondon". Jes estas la "evoluinta mondo",

la eŭropanoj, la koloniintoj kiuj estigis la mizeron, la demografian eksplodon, la plej katastrofan ekologian mal-ekvilibron de nia tera planedo per la detruo de la lokaj homaj valoroj. Mi scias ke estas malfacile akcepti tion, sed estas fakto; pro tio simpla retiriĝo pro supozita sendependeo, pro pseŭdo-emancipiĝo estas flanke de la ekskoloniistoj vera krimo kaj unu el la plej kovardaj sintenoj de nia homaro... La nacioj, kiuj koloniis ja por ekspluati ĝis la krevo, kaj ĝis nun ankoraŭ pro intereso kaj avido, celas instali la "ekspluatan evoluon", detruante la lokajn homajn valorojn kaj civilizacion, ne povas subite rezigni pri evoluigaj laboroj pro ambicio de kelkaj fanatikuloj, kandidatoj al diktatorado kiel Tjibaou... Sendube la retiriĝo fariĝas tutsimple katastrofa. La tuta Afriko estas pli ol sufiĉa ekzemplo, por pruvi ke tio estas "Nia problemo" (t.e. de la ekskoloniistoj). Kompreneble, tiuj diroj havas nenion komunan kun subteno al koloniismo... sed kun konscio pri la konsekvencoj de la koloniado, koloniado kiun ni ĉiuj kondamnas. Ho ve, la koloniado okazis, do ne utilas plu paroli pri kondamno, ne utilas plu paroli pri emancipiĝo, liberiĝo, suvereneco antaŭ ol la invadintaj koloniistoj klopodu se ne ripari, almenaŭ mildigi la kaŭzitajn damaĝojn el civilizaciaj malkongruoj.

Ja la temo estas komplika. Por tiuj kiuj interesiĝas mi kun konvinko konsilas la legon de mia libro nun jam eldonita "**Sennaciece tra nia mondo**". Kiel pozitivan referencon mi aldonas, ke ĉi libro estis cenzurita kaj kondamnita de la jam menciita SAT-cenzuro.

ROBERTO :

Al Jakelin

*Vi juĝas subjektive SAT pro via malsukceso invadi **Sennaciulo-n** per viaj diaĵoj, kiuj ŝajnas ne esti via ĉiutaga pano, sed vi amegas la retorikon. Ne kredu, ke SAT-anoj pli stultas ol vi, sed ne utilas polemiki pri Lanti, kiun influis la rusa revolucio (Vi estas tro "juna" por kompreni la tiaman spiriton). Do vi parte pravas pri lia sennaciismo, tamen multaj postlantiaj SAT-anoj ŝanĝis la enhavon de lia universala ideo. Ne timu, ke SAT markiĝos, eĉ se vi ne komprenas la skribaĵon de Y. Peyraut.*

PRI LA PRINCIPO DE NECESO KAJ SUFIĈO

Ĉu "aktualigi" la Fundamenton ?

(Vd. artikolojn de Rejal en L! 83)

Car Rejal dezirus "koni la reagoj de la legantoj" pri liaj proponoj, jen estas miaj.

Unue mi aprobas senbalastigon per forlaso de nenecesaj sufiksoj, konforme al la jam malnova iniciato de Lanti (kaj de Zamenhof). Sed mi opinias, ke Rejal pelas tro antaŭen tiun simpligon. Por ekzemplo, kiam li volas anstataŭigi "blankigi" kaj "blankiĝi" per "blanki". Laŭ mi blanki signifas : esti blanka. La neĝo blankas, same kiel en la fabelo "Blua Barbo", la suno ruĝas kaj la vojo polvas. Ni do rezervu la simplan formon por ĝia signifo, kaj uzu la precizajn sufiksojn **ig** kaj **iĝ**, prave enkondukitaj en la Fundamento.

Rimarku, ke en tiu lasta frazo mi forlasis superfluan akuzativon, konforme al konsilo de Rejal, kaj mi akceptas lian kritikon pri "mi povas citi Viktoron Hugon". Cetere, kiel li mem notis, la forlaso de superflua akuzativo estas konforma al konsilo de Zamenhof mem. Sed ni atentu, en ĉiu okazo, ke tiu forlaso ne estigu konfuzon.

Nun pri adjektivoj neŝanĝeblaj. Tiel estas ja en la angla lingvo, kiu tiurilate estas pli simpla ol la Fundamenta esperanto. Post pripenso, tiu propono ŝajnas al mi akceptebla; ni tamen devas pli longe pripensi kaj demandi nin, kial Zamenhof ne adoptis ĝin imite al la angla simpleco : eble ni eltrovos motivon.

Ĉiaokaze, tio estus grava ŝanĝo en la Fundamento, kiu devas resti netuŝebla, eĉ kun siaj eventualaj eraroj, laŭ la propono de Zamenhof ĝis nun akceptita de ĉiuj esperantistoj, kiel neceso por la unueca uzado de la lingvo.

Mi konfesas, ke la ŝanĝoj proponitaj de Rejal estas malpli danĝeraj ol tiuj de la "moderna" esperanto, kaj ke ili meritas seriozan atenton ; sed al mi ŝajnas ankoraŭ tro frue por ilin tute akcepti.

VALO

PRI LA PRINCIPO DE NECESO KAJ SUFIĈO

Respondo al Rejal en Laŭte 83

Ankaŭ mi rimarkis la ŝajnan monotonecon de parolata Esperanto, pro kiu plendis Rejal. Tamen, tiu monotoneco estas laŭ mi ne manko de la lingvo, sed manko de certaj parolantoj, eĉ multaj parolantoj, de ĝi. Mi ne dubas tion, ĉar mi konas ankaŭ parolantojn de Esperanto, kiuj sukcesas prononci ĝin, tiel ke ĝi tute ne aŭdiĝas monotone. Ni devus pli zorge studi la prononcon de nia lingvo, antaŭ ol ŝanĝi la gramatikon.

Al lernanto de Esperanto estas instruate, ke la prononco kaj skribmaniero de Esperanto estas tute regulaj : unu litero por unu sono. Tio estas vera, en la senco, ke Esperanto estas preskaŭ ĝia propra fonema transskribo. Unu litero respondas al unu fonemo, sed tio ne signifas, ke unu litero respondas al unu alofono. (Pri la gravega diferenco inter "fonemo" kaj "alofono" legu en iu libro pri fonetiko). Mi povas klarigi tion pli facile per ekzemplo : la plej grandan alofonan variadon kaŭzas en Esperanto la akcento, kaj akcenta O ne devas esti prononcata same kiel neakcenta O.

Car lernantoj de Esperanto ofte havas nenian modelon por imiti, ofte ili aŭ uzas la parolmanieron de sia gepatra lingvo, kiam ili parolas Esperanton, aŭ ili parolas ĝin laŭ maniero tute meĥanika, kvazaŭ ili laŭvorte kredus la diraĵon "unu litero, unu sono" ; ĉiu lingvo aŭdiĝas monotone, se oni prononcas ĝin tiel. Mi neniam konis homon, kiu forlasis Esperanton pro la teda kaj monotona maniero, laŭ kiu multaj esperantistoj parolas ĝin, sed se Rejal pravas, kaj tio ja okazas, tiam estas nepre necese, ke ni esperantistoj komencu pli serioze interesiĝi pri fonetiko.

La sekcio en PAG pri fonetiko ne estas granda, sed enhavas multajn utilajn rimarkojn. Unu grava rimarko, kiun ĝi povus enhavi, tamen ne estas farita. Kiel ĉiu scias, en Esperanto "la akcento troviĝas senescepte sur la antaŭlasta silabo" (PAG §18). Tamen, kio estas akcento ? En la franca, ekzemple, ne ekzistas akcento kiel tiu, kiu ekzistas en la angla aŭ en la germana, kaj kiam franco parolas la anglan aŭ la germanan, normale li ne faras sufiĉe

grandan diferencon inter la akcentaj kaj neakcentaj silaboj. Se franco faras la saman eraron parolante Esperanton, la rezulto devas esti tre monotona kaj teda lingvo. (Imagu, ke oni parolas Esperanton precize laŭ la franca maniero, preskaŭ sen akcentaj silaboj kaj kun malforta akcento sur la lasta silabo de ĉiu "grupo"! Provu tiun parolmanieron, kara leganto, kaj verŝajne vi ricevos pli bonan ideon pri la graveco de akcento.)

Kompreneble ne estas nur francoj, kiuj faras el Esperanto monotonan kaj tedan lingvon. Angloj prononcas ĝin ĝuste tiel malbone. Kvankam ili faras en sia gepatra lingvo grandegan diferencon inter vokaloj en akcentaj silaboj kaj vokaloj en neakcentaj silaboj, tamen ili ial ne komprenas fari similan diferencon en Esperanto. Verŝajne ili komencas paroli Esperanton kiel lernanto de iu ajn lingvo - meĥanike - kaj pro manko de bonaj modeloj por imiti, ili neniam progresas al pli bona parolmaniero. Kiom da esperantistoj, de iu ajn nacio, pensadis serioze pri sia prononco kaj parolmaniero en Esperanto ?

Do mi ne opinias, kiel Rejal, ke la ŝajna monotoneco de parolata Esperanto estas kialo por ŝanĝi la gramatikon. Pli taŭge estus, laŭ mi, studi la parolmanieron de tiuj esperantistoj, kies lingvaĵo ne aŭdiĝas monotone, kaj imiti kaj lerni. Memoru, ke eĉ pluraj famaj kaj respektindaj esperantistoj, kiuj tute mastras la skriban lingvon, prononcas ĝin tre malbone.

Ankaŭ la plendo pri "Viktoron Hugon" estas laŭ mi nenia argumento pro la neuzo de akuzativa N. Ĉu Rejal vere proponas, ke oni devus diri : "Ĉi tie mi povas citi Viktoro Hugo"? Se oni sentas la bezonon doni al "Victor" la gramatikan finaĵon -o, kaj ŝanĝi la C en K, tiam oni jam fuŝas la propran nomon, kaj aldono de akuzativa N, kondiĉe ke la lasta silabo estu malforte prononcata, ne doloras. Mi ne havas fortan opinion pri la uzo de ne-Esperantaj propraj nomoj en Esperanto, ĉu oni devus esperantigi ilin, kaj kiel, sed se iu volas kritiki Valon pro lia retorika maniero de bona advokato, ĉu tiu farus la saman kun la propra nomo de Zamenhofo, se li volus citi Zamenhofon. Mi mem neniam donis al la nomo "Zamenhof" gramatikan finaĵon, kaj mi normale prononcas ĝin laŭ la germana

maniero - "càmenhof". Aliajn nomojn, kiel "Londono", "Kembrigo" kaj "Oksfordo" mi preskaŭ ĉiam esperantigas. Por ni esperantistoj, la plej multaj propraj nomoj estas "fremdaj vortoj", kaj fremdaj vortoj kausas problemojn en ĉiu ajn lingvo. (Por miaj universitataj ekzamenoj en la germana lingvo mi skribis milojn da vortoj pri "Fremdwörter" (fremdaj vortoj) en la germana lingvo, sed mi ne tedos vin per aro da ekzemploj.)

Pri la uzo de IG - IĜ, estas certe vere, ke multaj esperantistoj trouzas tiujn sufiksojn, ofte ĉar ili ne scias, ĉu la baza verbo, sen sufikso, devus esti transitiva aŭ netransitiva. Estas vere, ke tia trouzo lacigas la aŭskultanton, kaj la propono, ke oni ne devu uzi la sufikson kun verboj derivitaj el adjektivoj - ekzemple blankigi, blankiĝi - eble meritas seriozan konsideron. Tamen la neuzo de la sufikson en aliaj kazoj ofte ne estas tiel taŭga. Ekzemple : "la oficiro anstataŭis la gardiston". Laŭ la propono de Rejal, kiel oni devus kompreni tiun frazon ? Ĉu estas sufiĉe klare, ke oficiro ne plenumus mem la rolon de gardisto, kaj tial la frazo devas signifi "la oficiro anstataŭigis la gardiston"? Kaj en tiu kazo, kion oni devus diri, se la oficiro vere decidis gardi mem ? Certe oni tiam devus eviti la cititan frazon.

Rejal demandis "kial ne vortlibro [anstataŭ vortaro]?" Bonega demando! Kiam mi skribis pri "limigataj vortprovizoj" (Laŭte 83), mi vere volis diri "aro de vortoj", t.e. "vortaro", anstataŭ "vortprovizo". Bedaŭrinde oni jam uzas "vortaro" por signifi "vortlibro". Laŭ mi "vortlibro" ja estus pli logika; eble ni povus malrapide enkonduki tiun novan uzon. Respondante al la demando : verŝajne ĝi estas pro la slava influo; en la rusa "slovo" estas vorto, kaj "slovarj" estas vortaro. (Eble estas kelkaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne sciis tion.)

Mi ne ŝatas la ideon, ŝanĝi Esperanton, ĉar iu ŝanĝo verŝajne estus akceptita nur de kelkaj esperantistoj, kaj ni certe ne volas krei "eŭropan dialekton" de Esperanto, kiu estus malsama ol la "ĉina dialekto" aŭ ol la "nord-amerika dialekto", ktp. Sed unu reformon de la Zamenhofa lingvo mi intence faris en ĉi tiu teksto. Ĉu iu leganto rimarkis? Ĝi koncernas la signifon de "ne devas". (Vidu PAG §91. Rim 1.)

E T Grimley Evans

André GILLES :

PRI LA REGULA ESPERANTO

Respondo al Rejal

La reformaj proponoj de Rejal en L! 83 estas tute ne novaj. El la emo plisimpligi esperanto^m ellaboriĝis Ido antaŭ pli ol ok jardekoj, kaj multaj aliaj lingvopropoj proponis la samajn, aŭ similajn argumentojn. Ili ĉiuj mortis. Espo daŭre ekzistas.

Necesas komprenigi al la nuntempaj reformemuloj, ke modifi la fundamentajn regulojn, eĉ la alfabeton, estus arkaikigi nian tutan ĝisnunan verkaron kaj konfuzi tre multajn el la nuntempaj esperantistoj, pli speciale la novbakitajn. Pli-malpli baldaŭ tio neeviteble rezultigus la morton ne nur de esperanto, sed de la tuta mondlingva afero. Kiu el ni tion dezirus ?

Monotoneco de la gramatikaj finaĵoj aperas ĉe neĝusta akcentado de la vortoj. Multaj franclingvanoj kulpas en tio pro sia mislokado de l' vortakcento fine de plur-silabaj vortoj. Ankaŭ tio estas herezo rilate la Fundamenton. Akuzativigo de esperantigitaj propraj vir- kaj loknomoj estas konsilinda. Tio ne pli fuŝas tiujn nomojn, ol la francaj adjektivoj goethéen, dantesque, shakespearien fuŝas la respondajn universaligintajn autornomojn. Same Cologne (Köln), Londres (London), Moscou (Moskvà) estas tute ĝustaj en la franca, kiel Kolonjo, Londono, Moskvo en esperanto, kompreneble kun eventuala akuzativigo se regule.

La propono jen uzi, jen neuzi la akuzativon rememorigas al mi la Ido-regulon, laŭ kiu oni uzu la akuzativon nur ĉe inversio; ekz-e en Ido : me vidas la homo - la homon me vidas. Tia harfenda "bizancismo" montriĝis neelportebla subtilaĵo. Superflue estus doni ekzemplojn, el kiuj evidentigis, ke dank'al la akuzativo esperanto estas foje pli klara, ol la franca lingvo.

La reguloj pri -ig- kaj -iĝ- estas tial netuŝendaj, ke modifi ilin estus ne nur grave malklarigi la lingvon, sed eĉ funden detruu la ĝisnunan uzadon de esperanto kaj ties literaturon kaj senvalorigi niajn vortarojn kaj gramatikojn. Eĉ potencaj nacilingvoj ne povus permesi al si tion! Des

malpli ni mem...

Resume : La lingvaj reguleco kaj fideleco estas la esenca valoro de esperanto. Malgraŭ la supersignoj kaj la akuzativo nia lingvo jam travivis pli ol unu jarcenton. Sen supersignoj kaj akuzativo la tuta cetera projektaro fiaskis. Tiu historia sperto admonu nin al daŭra lingva disciplino!

Erich Fried (tradukis Hagen Hirte)

LA LIMO DE LA MALESPERO

Mi tiel amas vin
ke mi ne plu scias
ĉu mi tiel amas vin
aŭ ĉu mi timas

ĉu mi timas vidi
kio sen vi
de mia vivo
ankoraŭ restus vivanta

Por kio lavi min plu ?
Por kio plu voli saniĝi ?
Por kio plu scivolemi ?
Por kio plu verki ?

Por kio plu voli helpi ?
Por kio el la harstrioj de mensogoj
kaj kruelecoj elkombi la veron plu
sen vi ?

Eble tamen pro tio ĉar vi ekzistas
kaj pro tio ke estos aliaj homoj
kiuj samos al vi
kaj tio eĉ sen vi

SEN VI

Ne nenio
sen vi
sed ne la sama

Ne nenio
sen vi
sed eble malpli

Ne nenio
sed malpli
kaj malpli

Eble ne nenio
sen vi
sed plu ne multo

MEVA MARON :

ARBARSILENTO

(laŭ motivoj de Ihor Kaĉurovski,
ukraina poeto el Bonaero,
- kaj danke al Ergoto pro la papilioj)

Maldun en mit' irlanda vagis
dum venĝvojaĝon urĝis ŝtorm'
al foraj bordoj; ni imagis
nenion tian, eĉ en dorm'
- sed jen la kelka mit', insuloj
de floroj, fruktoj kaj silent'...
ĉu fine la marondaj luloj
elĉerpos min? (anstataŭ pent')

Sudokcidenten. Nokta kurso.
Najlitaj brile trans la kap'
la steloj de - anstataŭ l'Urso -
la suda kruc' surdorse; gap'
senĉese serĉos Liron, Cignon
kaj nordon per la Granda Ĉar'
- dum regas nin aliaj signoj,
portata ĝis Golgoto ŝarĝ'.

Ĉu burdo? Per malsama vibro
ĝi gurdas, ĉi fluganta flor'
tra l' **sejbaj** branĉoj. Ne: kolibro.
Videblas longan tempon for
fabela bird', infana libro...
Ilustris belon iluzi';
reloku plumojn, ekvilibro,
malfermokule sur foli'.

Siringe bluaj arboj floras,
aromebrie plaŭdas sud'.
Miraklan mondon ni esploras
dum fremdaj vortoj sen alud'
mortigas revojn kaj nebulajn
misterojn per senplua kliŝ';
mi serĉas certan floron, bluan,
sen nom' en iu ajn **ingliš**.

Urbanoj, verdĉabele varbas
bambu', ombu', **mburukuĵa'**;
skarabo basas, interarbas
metalspegula Parana'.
Heder' arbustojn volve kaŝas;
post bordondad' arbarsilent'
laŭ forgesita pad' enpaŝas
la koron - kun senŝia sent'

Nokt' ombas. L'orient' ekoras.
Koloroj. Tremas kor' en frost';
siringa heĝ' el nubo floras
kvazaŭ knabino sparus post
siringa heĝo... Nubaperto;
ĉu mi respondu nur per velk'?'
Sed plaĉas nova nuba sperto
dum oni aĝas tridekelk.

LIBELA KARAMBOLO

Ĉu malaperos do libel'?'
Libela karamel'?' Ĉu vere?
Ĉu malaperos vesp' el flor'?'
Ĉu vespon for de l'franĝo peli?
Mi estas je l'nivel' de l'vel',
de l'ciferrplato, vaksnivele...
Kaj ĉio ĉi - esper', esplor',
enspir', eterna spir'... Ĉu vere?

(laŭ la rusa de Elena Tolmaĉova)

KONFLIKTO

(al Ergoto - ĉu la sola, kiu legas min?
- danke pro la vorto "remio")

Dum kupra papili' etendas
flugilojn sur erikamfor',
ripoze sur purpuro pendas...
- jam ekseptembras, jam kamfor'
efikas, ruĝas jam lagaca
kolorkontrasto!) krom licen'
erik-kaliko, karapca
filiko.. lace velkaj en
pinaro.

A. Lopez Luna IOMETE PRI FILOZOFIO

Mia samideana amiko Adán Hryniewicz, kiu uzas la pseŭdonimon "Ergoto de Bonaero", aperigis sur la paĝoj de **Laŭte!** artikolon pri Psikotransformismo kaj ties aŭtoro, Georgo Ivanovitch Gurdjieff (1866-1949).

Mi devas konfesi, ke la konado de la ideoj de G.I.G., kio okazis en la jaro 1964-a, kiam mi estis 50-jaraĝa, ŝanĝis mian vivon, donis al mia vivo alian direkton. Aliaj aŭtoroj kaj mia partopreno en diversaj movadoj - Esperantismo, Rozkrucismo k.c. - helpis min progresi spirite kaj intelekte. Sed estis G.I.G., kiu malkovris al mi la ŝlosilon, kiu al mi mankis.

Laŭ G.I.G. ekzistas 7 kategorioj de homoj pri kiuj mi ne parolos en tiu ĉi artikoleto; sed en la konkreta mondo, tiu en kiu vi kaj mi troviĝas, disvolviĝas nia vivo, ekzistas 3 klasoj de homoj :

- 1) La vulgaruloj.
- 2) La mezklasa intelektularo.
- 3) La filozofoj.

La plejmultego el la homoj troviĝas inter la vulgaruloj, sed tio ne signifas malŝati ilin; kontraŭe : tiu amaso estas la plej respektinda kaj tiu, kiu irigas antaŭen la mondon.

Danĝeraj estas tiuj, kiuj pere de universitataj studoj troviĝas inter la mezklasa intelektularo, tamen ilia koro estas malvarma kaj malŝatas la kunhomojn. Multaj senidealaj politikistoj troviĝas en tiun kategorio. Eĉ se ili posedas tre altan intelektan kapablon, ilia spiritualismo estas malalta. Ili posedas sciencon, sed ne konsciencon. Ili estas tre danĝeraj por la homaro.

Homo, kiu aspiras al la saĝeco, devas klopodi leviĝi el la vulgaruloj kaj atingi la gradon de filozofo, nome, havi komprenon pri si mem kaj pri la homoj kaj, ĉefe, ami la kunhomojn.

En nia movado, laŭ mia opinio, troviĝas inter la filozofoj, interalie, nia Majstro, L.L. Zamenhof, la ministropoeto Josef Burger (1881-1970), E. Lanti...

Ni diru, ke en la profana mondo filozofoj sin konsideras la plej alta intelekta klaso, tiu, kiu troviĝas ĉe la supro ; dume verkistoj, advokatoj, kuracistoj kaj ĉiuj aliaj universitatoj apartenas al la mezklasa intelektularo, ĉar "ili ne atingis la altajn suprojn de la filozofio".

Tamen estas necese bone reliefigi, ke doktoro pri filozofio estas nura diplomito, dum filozofo estas tiu homo, kiu serĉas la veron senĉese kaj amas la kunhomojn. Sola intelekta kapablo ne sufiĉas por ke oni sin nomu filozofo.


Komenti la **Kritikon pri la pura Racio**, de la famega Immanuelo Kant (1724-1804) ne estas filozofi. Brile lekcii pri la "noŭmeno" ankaŭ ne estas filozofi.

En ĉi tiu artikoleto, kiun vi legas, mi, modestulo, faras filozofion, eĉ se la sola diplomo, kiun mi posedas, diras : "Profesoro pri Beletro".

En la ĉi-suba grafikaĵo mi prezentas al vi, resume, la evoluon de mia vivo kaj montros al vi kiel mi altiĝis ĝis filozofo.

Mi prezentas al vi mian vivon, ĉar ĝi estas tio, kion mi plej bone konas. Sed ankaŭ vi, kiu legas ĉi tion, povas pretigi similan grafikaĵon pri vi.

En mia spirita kaj intelekta evoluo, krom la aŭtoroj kaj movadoj menciitaj en la suba grafikaĵo, kiuj impulsis min antaŭen supren, troviĝas ankaŭ privatuloj, sed ne estas eble menciitaj ĉiujn. Bonvolu, do, vidi :



x Naskiĝo.

1. Verkoj de Anatole France (1844-1924) igas min progresi.
2. Verkoj de Eca de Queiroz, portugala verkisto, impulsas mian progreson.
3. Lernado de Esperanto (jaro 1934-a) multe pligrandigas mian spiritan

kaj intelektan progreson.

4. Legado de verkoj de E. Lanti (1879-1947) donas al mi alian vidpunkton pri la homa vivo.
5. Rozkrucismo ampleksigas mian vivon.
6. Framasonismo antaŭenpuŝas min.
7. La ideoj de G.I. Gurdjjeff (1866-1949) donas al mi la ŝlosilon por koni homajn aferojn kaj mi povas eniri en la filozofian kampon.

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj !

A. Lopez Luna

Marcelo Leereveld (Aŭstralio) :

TURKOJ EN BULGARIO

Mi scias, ke la bulgarioj estis dum longa tempo (jarcentoj) sub la (tiam) kruela jugo de turka potenco. Estis la rusa armeo, kiu liberigis Bulgarion de la turkoj, kaj ankoraŭ la bulgara popolo estas pro tio tra danko kaj simpatia al Rusio.

Mi scias ankaŭ, ke bulgara kaj rusa armeoj, antaŭ la Unua Mondmilito, okupis la nunan eŭropan parteton de Turkio kaj agis kruele al la turkoj.

Sajnas al mi, ke la bulgarioj timas kaj memoras plian malfeliĉan historion ol la turkoj sian, kaj tio kompreneblas, se oni konsideras la relativajn longecon kaj vastecon de la du terurigoj.

Mi krome scias, ke la nuna turka registaro estras policoŝtaton, en kiu normalas akra kaj tortura persekutado kaj mortigado ante politikajn kontraŭulojn. Pri Bulgario mi ne scias, escepte ke la turka propagando mencias torturadon ante turkajn loĝantojn en Bulgario, kaj ke Amnestio Internacia mencias enkarcerigojn de kelkaj bulgariaj turkoj, kiuj rifuzas bulgarigi siajn turkajn nomojn.

Do kiam, antaŭ kelkaj monatoj, mi vizitis ambaŭ landojn (antaŭ ol grupoj de bulgariaj turkoj elsendatis, aŭ libere eliris, el Bulgario al Turkio), mi volis ekscii, kia la afero statas. Bedaŭrinde ne eblis paroli en Bulgario kun turkoj aŭ en Turkio kun eksbulgarianoj. Do mi turnis min en Bulgario al sofiaj esperantistoj kaj en Turkio al istanbulaj esperantistoj, esperante ricevi sufiĉe netendencajn klarigojn.

La sofianoj klarigis, ke tiuj turkoj, kiuj ne deziras bulgariĝi, plejparte deziras elmigri al Turkio (precipe pro sia islamanece) sed ke Turkio ne volas akcepti ilin pro timo ke ili kaŭzos malfacilaĵojn, al kutimiĝinte al pli honesta socia vivo en Bulgario. Laŭ la sofianoj kulpas nur la turka registaro.

Inter la istanbulanoj estis du diversaj opinioj. La prezidento de la Esperanto-Asocio en Turkio (la registaro malpermesas uzi la vorton "turka" en la titolo de la landa E-asocio), antaŭa altrungulo militista, kaj "amiko" de William Auld, jam antaŭe dissendis al tutmondaj E-gazetoj tutpaĝan "klarigon" subskribitan per "la turkaj geesperantistoj". En tiu propagandfolio li rakontas pri la mola kaj simpatia traktado ante la bulgariojn dum la otomana (turka) regado, kaj pri la subpremado, mistraktado kaj mortigado ante la bulgariajn turkojn el antaŭ 80 jaroj ĝis nun. Li krome akuzas la bulgariajn esperantistojn kontraŭturke falsi la historion kaj silenti pri la terura traktado okazanta en Bulgario. La celo de la folio estas "petegi la gazetojn Esperantajn helpi haltigi la torturojn en Bulgario". Kelkaj aliaj Esperantistoj istanbulaj (kiuj sekrete estas ankaŭ ateistoj) montris al mi malpli da simpatio por la bulgariaj turkoj.

Ĉu ambaŭ flankoj pravas? Aŭ nur unu? Aŭ neniu? Mi ŝatus scii la veron.

Oksana :

AŬGUSTAJ DATREVENOJ

23.08.1939. - pakto pri neagreso inter nazia Germanio kaj stalinista Sovetio. Subskribita de la popola komisaro de eksterlandaj aferoj Molotov kaj ministro de eksterlandaj aferoj de Germanio von Ribbentrop.

3.08.1940. - Litova SSR aliĝis al USSR.

5.08.1940. - Latva SSR aliĝis al USSR.

6.08.1940. - Estona SSR aliĝis al USSR.

Aŭgusto en Francio estas monato de ferioj. Do, pri seriozaj temoj oni ne tre emas paroli. Kaj tamen paroli necesas.

Okazis tiel, ke ĝuste la 23-an de aŭgusto mi devis traduki la instrukcion n-ro 001223, kaj tradukante ĝin

mi re kaj re revenis al la letero de s-ro B. Aunis kaj mia respondo al li /"Konsterno"/. Ĉar la instrukcio temas pri deportado. Por esti preciza : "pri metodoj de deportado de kontraŭsovietiaj elementoj el Litovio, Latvio, Estonio". Instrukcio estas tre detala : kiel okazigi preparon de specialaj grupoj, kiuj okupiĝos pri deportado; kiel prepari listojn de deportotoj; kiam komenci "operacojn" (frumatene); kiel ĉirkaŭi domojn de "kontraŭsovietiaj elementoj"; kiel kunigi ĉiujn membrojn de familio en unu ĉambro kaj nur tie anonci pri deportado; kiel traserĉi domojn (serĉante armilojn kaj "kontraŭrevolucion literaturon"); kiom da tempo familianoj preparu sin (ne pli ol du horojn); kion ili rajtas kunpreni kaj kiom da (ne pli ol 100 kg por persono); kiel prepari la dokumentojn de deportota familio tiamaniere, ke familianoj ne suspektu, ke tuj post alveno al fervoja stacidomo ili estis disigitaj (patron oni arestos kaj metos en specialan koncentrejon, dum reston de familio - en foran lokon en Siberio); kiel veturigi deportitojn ĝis stacidomo kaj kiel enmeti ilin en trajnojn ktp. Kompreneble - kion fari se iu rezistas, se amasiĝas najbaroj ĉirkaŭ domo kaj protestas...

Instrukcion verkis instruitaj homoj. Ili ne uzis "krudajn vortojn". Ne, ĉio glatas. Oni deportas ne homojn, sed "elementojn", oni ne kaptas homojn perforte kaj metas ilin en brutvagonojn - oni "realigas operacon" ktp. Kion memorigas tiu instrukcio?... Jes, same agis nazioj. Iliaj instrukcioj kaj raportoj pri deportado de judoj (kaj alinacianoj) estis same sekaj, precizaj, aferecaj. Ili ne murdis homojn, ne. Nur likvidis "elementojn". Se nazioj venkus, estus tre malfacile por historiistoj pruvi, ke deportadoj ĝenerale okazis.

Mi ne scias numeron de instrukcio, laŭ kiu okazis deportado de krimeaj tataroj. Sed ĝi verŝajne en multaj punktoj laŭvorte ripetas la ĵus cititan. Kial mi tiom insistas pri la temo? Ĉar necesas finfine diri laŭte veron ne nur pri deportadoj far nazioj, sed pri stalinistoj ankaŭ. Aliel ni daŭre vivos en "tordita mondo" - mondo, en kiu nur parto de vero estas agnoskita kaj vaste konata, kaj alia parto - ne. Krome - oni ne rapidu juĝi pri krimeaj tataroj (ekzemple), sen necesaj scioj pri l' okazintaj eventoj.



RAPORTO PRI FONDIĜO DE LA EKOLOGIISTA FRAKCIO DE S.A.T.

Dum la 62a SAT-kongreso en Illertissen-Bavario, fondiĝis la ekologiista frakcio. La unua kunveno de la frakcio okazis ĵaŭdon la 10an de aŭgusto, je la 18a horo. Kunvenis deko da homoj, plejparte junaj, inter kiuj 4 nuntempe ne membras en SAT. Laŭ tagordo proponita de mi, jen la pritraktitaj punktoj :

1. Nomo de la frakcio

Inter la du eblecoj nomi la frakcion verdula aŭ ekologiista, la duan terminon preferis la plimulto pro ĝia -laŭdire - klara enhavo.

2. Minimuma difino de la vorto ekologiismo

Jena difino fontis el la grupo : "respekto de ekologiaj principoj en ekonomiaj, politikaj kaj personaj decidoj, kadre de la ĝenerala idearo de SAT".

3. Celoj kaj agadoj

Jena vicigo ne montras ian ajn prioritatigon de la menci-otaj eroj, sed nur la kronologian aperon dum la diskuto:

- doni praktikajn konsilojn al individuoj, tra la gazetaro de SAT (ekzemple pri senkemia ĝardenumado, k.s.)
- subteni la porbiciklistan movadon
- dum SAT-kongreso, okupiĝi pri natur- kaj mediodemandoj
- klerigi per eldonado de broŝuroj pri difinitaj temoj
- havi poresperantan laboron ĉe verdulaj partioj kaj similaj (ekz. Greenpeace)

- klerigi la SAT-membrojn per artikoloj en **Sennaciulo**
- partopreni en alternativaj kaj ekologiistaj renkontiĝoj, foiroj, k.s.
- dum SAT-kongresoj, konsciigi la ĉeestantojn pri la kongresejaj ekologiaj problemoj
- organizi renkontiĝojn pri ĉiutaga praktika ekologiista vivo
- organizi vizitojn al ekologiaj centroj naciaj
- eldoni ekologiisman kalendaron pri venontjaraj foiroj, tendaroj, renkontiĝoj, k.s. kiujn markas ekologiismo
- rilati kun la ekologia sekcio de SEU
- havigi ekologian programon en alies renkontiĝoj

4. Rilatoj ekster SAT-programo inter la frakcianoj

La ĉefa ligo inter la frakcianoj montriĝas esti la 30 linioj kiujn la frakcio rajtas disponi en ĉiu numero de **S-ulo** (nu mi jam tajpis pli ol 30 liniojn!), laŭ la regularo de SAT. Pri tiu duonpaĝo necesas kunordiganto, kies rolon mi nun pretas ludi. Ni ne pripensis la eblecon havi propran eldonaĵon, ĉar la bezono ankoraŭ ne montriĝis! Krome por ebligi la rektan interrilaton de la frakcianoj, estos eldonita kaj sendita al la sinanoncontaj frakcianoj adreslisto de iliaj sampensanoj. Komputilreton oni menciis, tamen sen doni pli da konkretaj planoj (mi ne estas komputilisto kaj ne scias kiel starigi tian reton).

5. Rilatoj kun SAT

Mi mem pensis pri financaj rilatoj tiel ke ereton de la SAT-buĝeto ricevu la frakcio. Tiu ideo ne renkontis multe da entuziasmo/kredemo ĉe la kunvenantoj. Iuj asertis, ke la frakcianoj mem devas finance kontribui, dum mi argumentis ke SAT-anoj jam pagas sian kotizon kaj tial rajtas iom postuli de sia asocio, kompreneble proporcie al la forto de la frakcio.

6. Rilatoj kun parencaj esperantaj organizoj

Necesas informi kaj eventuale kunlabori kun AVE (asocio de verdulaj esperantistoj) pri poresperanta agado. Kun la naturprotektaj asocioj (Koko, TANEF, k.a.) eblas kunlabori tiel ke ili havigu al ni prelegontajn fakulojn, k.s.

7. Estonto

Du kunvenantoj konkrete kaj precize proponis sin por verki klerigajn artikolojn. Aliaj emas ion fari sed deklaras sin nekompetentaj.

Tiel finiĝis la kunveno kaj jen komenciĝas miaj komentoj : Mi devis dumkunvene kaj deziras ree emfazi, ke mi fondis (kaj pretas aktivi por) ekologiisman kaj ne mediprotektan frakcion. Ekologiismo ne povas resti neŭtrala: klasbatalo ja ekzistas, sed ne nur inter proletoj kaj kapitalistoj, sed ankaŭ inter landoj riĉaj kaj malriĉaj, inter viroj kaj virinoj, inter naciaj plimulto kaj malplimulto, kaj ankaŭ inter vivantoj kaj vivontoj (kio restos por niaj praidoj se ni foruzas/fordetruas la planedon?). Tial, mia opinio, la prizorgo de besta aŭ planta vivo nur duarangas en la klasbatala ekologiismo, dum ĝi unuarangas en mediprotektaj organizoj. Mi estas AVE-ano kaj restos AVE-ano se AVE ne decidus memdissolviĝi, sed mi fondis tiun ĉi frakcion ĉar ĉagrenis min la malrapida senavigliĝo de SAT (nur la liberecana frakcio vere vivas nun) dum AVE-laboro ekster SAT ŝajnis al mi tro neŭtrala.

Viajn komentojn, proponojn, ideojn, konkretajn planojn mi, kiel kunordiganto, fervore atendas. Monan helpon vi ne sendu antaŭ ol la bezono akre montriĝas, sed vi ja rajtas komuniki kiom finance vi pretas kontribui al la vivo de la frakcio. Ĝis la venontaj 30 linioj en **Sennaciulo!**

Claude Rouget

Olastien 8-A-120, N-9000 Tromsø

PRI "Liberecana Ligilo"

Ĉu vi, legantoj de **Laŭte!**, kiuj skribas liberecanajn artikolojn en ĉi tiu interesa revuo, scias ke, L.L. akceptus tre favore viajn artikolojn ? Ĝi ekzistas de 30 jaroj kaj reprezentas ĉiujn liberecanajn tendencojn. La partoprenantoj kunvenas fakte en ĉiu SAT-kongreso. Tiuj kunvenoj ebligas al ĉiu diskuti rekte pri la liberecanaj problemoj sennaciece. Ne ekzistas kotizo, ĉiu sendas monon laŭvole, laŭpove, tiel ni konkretigas nian solidarecon. Lastjare, ni renkontis junajn argentinajn, brazilajn liberecanojn. La kunvenoj estis fruktodonaj, eĉ por **Laŭte!**

Roberto

Bruno Guilloré, 29-jara edukisto, patro de du infanoj, estis kondamnita al unu jaro da mallibero pro soldatservrifuzo. La soldatservon li rifuzas pro siaj liberecanaj konvinkoj, kaj la anstataŭan civilan servon li rifuzas pro la fakto, ke en Francio ĝia daŭro estas la duoblo de la daŭro de la soldat servo. Skribu al li :

Bruno Guilloré, mat. 14.941.405.C., Maison d'arrêt, BP 3005,
F 80030 AMIENS CEDEX

La E-Grupo en NICO informas pri la BIBLIOTEKO

Kiam antaŭ kelkaj monatoj mi translokis la librojn de la grupo, mi demandis al mi kiel uzi tiun riĉaĵon.

Biblioteko estas tre interesa centro de aktivado por E-grupo, ĉar ĝi permesas valorajn interŝanĝojn de informoj kaj, de ideoj; ĝi ege utilas tiom por la novebakita, kiom por la spertoplena grupano; fakte ĝi estas tute necesa.

Sed biblioteko bezonas lokon por funkcii kaj taŭgan lokon en Nico ni ne havas; de pluraj jaroj ni estis rezignantaj trovi solvon; la libroj estis bone konservataj ĉe Georges sed ni ne povis ilin uzi kolektive.

Por transporti la librojn mi uzis mian ŝarĝaŭtomobilon (modelo "C35" Citroen) kaj, por malsuprenigi de la ŝrankoj de Georges, je la 6a etaĝo, ĝis la veturilo, mi uzis suramasigeblajn kuvegojn (kestojn el plasta materio, kiujn oni trovas en la grandaj magazenoj).

Tiam mi pensis pri la bibliotekbusoj de la urbo... Kompreneble mi ne povas dediĉi mian C35-on nur al la uzo en biblioteko, ĝi tro multe utilas al mi en miaj diversaj aktivadoj... sed rigardu tiujn kestojn, oni povas amasigi ilin unu sur la alian, la subaĵo sur la supraĵon sed, se oni kuŝigas ilin, oni povas ankaŭ amasigi ilin flankon sur flankon, tiel ili konsistigas bretaron... Se oni laŭvicigas la librojn tiel ke iliaj dorsoj aperas, la biblioteko estas tuj uzebla. Dum la transporto oni kuŝigas la kestojn sur la plankon de la veturilo. Kiam la biblioteko funkcias, oni suramasigas la kestojn flanksurflanke kontraŭ parieto de la ŝarĝaŭto. Kiam la biblioteko ne aktivas, la kestoj restas suramasigitaj unu sur la alia, en seka loko, kie ili okupas sur la grundo nur la surfacon de unu el ili.


Por enteni la 400 titolojn, kiuj ĝin konsistigas, la nica biblioteko bezonas 12 kuvegojn (dimensioj de unu: 36x45x23 prof.).

La investoj por organizi la bibliotekon entenas la kuvegojn, la slipojn, la slipujon, la klasifikkajeron, stampilon, skribilon, ktp... ili sumiĝas je ĉirkaŭ 550 FF, ne ruiniga sumo, ĉu ne ?

Post la nasko, la biblioteko povas pluvivi en memfinancado. Multaj malnovaj esperantistoj donacas malavare siajn librojn, kiujn ili ne plu uzas, al la biblioteko; la libroj donacitaj ĉiel pliriĉigas la bibliotekon, ĉu per aldono de titolo al la libraro, ĉu per sia brokanta vendado ili permesas rikolti la monon, kiu servos por aĉeti la plej lastajn eldonitaĵojn (libroj kaj ankaŭ gazetoj, revuoj, diskoj, kasedoj, propagandiloj...)

Pliajn informojn petu de

Jean-Pierre CAVELAN
164, Chemin de Saquier
St-ISIDORE - F 06200 NICE



NOVAĴOJ PRI BEAUVILLE

Kio do okazis dum la dua renkontiĝo en la renaskiĝanta muelejo de Beauville? Dum unu monato, sinsekve venis kaj pli-malpli longe restadis ĉirkaŭ 30 homoj plej diversaj laŭ deveno, aĝo, personeco, sed kiujn kunligis komuna intereso pri

la Muelejo.

Ja ne mankis kuraĝuloj, kiuj, pelate de la farendaj pliboniĝoj, sin ĵetis entuziasme, sindoneme kaj eĉ frenezete en la laboron.

Se ĝi povus paroli, la muelejo certe ne plendus pri la rezulto : ĝi akiris veran banĉambron (unue sen vando kaj poste ja kun vando kaj eĉ pordo ŝlosebla) tre oportunan por sin lavi ; novan plankon ĉe la subtegmentejo ; farbitajn ŝutrojn ; eĉ kvazaŭ miraklan ordigon de la ŝajne nevenkebla ĥaoso.

Ekstere, urtikon post urtiko, ĉarumon post ĉarumo, Gastono pacience, konstante kaj nelacigeble purigadis kaj plu purigadas.

Kaj estas pli oportune (laŭ la opinio de la naĝemuloj) sin bani en la rivertruo sen la arboj kaj diversaj malpuraj aĵoj, kiuj plenigis ĝin kaj kiujn efike kaj inĝenie forigis Jean-Luc.

Sed se la **Muelejo** kontentas pri sia pliboniĝo, kiu ebligas estontece ankoraŭ pli komforte renkontiĝi, kion opinias la vizitintoj kaj laborintoj pri sia restado ?

Laboro tro abundas
Mangoj tro malfruas
Dormoj tro maloftas
Tamen revenos mi... opinias Marcelo.

Persone, mi spertis multajn agrablajn kaj plezurojn

dum mia restado : interalie, mi ĝuis la amikajn rilatojn kun la diversaj partoprenantoj ; la refreŝigajn banojn ; la bongustajn kokinaĵojn breditajn de Solanĝa kaj la unuajn jogurtajn kukojn de Jako (tre sukcesajn laŭ la ĝenerala opinio) ; la kompotojn kaj tortojn faritajn el la lokaj fruktoj ; la demand-ludon elpensitan de Marcelo ; la kolektivajn deĵoradon ĉe la Esperanta budo okaze de Okcitana festo ; la gurdan muzikon kaj kanzonojn de Nikolin' sur la bazar-placo ; la registradon de absurda kaj amuza teatraĵo pri **kalva kantistino**, kiu neniam aperas, kaj de aliaj tekstoj, poeziaj aŭ humuraj ; la esploradon de la libroj kaj kasedoj de la biblioteko ; la biciklajn promenadojn (malgraŭ la ŝvitigaj supreniroj) ; la ekrealigon de internacia kuirlibro ; la komunan verkadon de akrostikoj ; ktp,...

La muelejo estis la muta atestanto de tiuj diversaj aktivecoj kaj de la diversaj etosoj, kiuj regis en ĝi : momentoj gajaj, optimismaj kaj harmoniaj ; kaj ankaŭ malkuraĝigoj antaŭ la granda farenda tasko, priduboj pri la celoj kaj eblaj orientigoj de tia loko.

Kio estas la **Muelejo** ? Kion ĝi povas proponi ? Kio farigos el ĝi ? Ne mi kapablas respondi, ĉar la muelejo farigos tio, kion ĉiuj interesatoj faros el ĝi.

Sed ŝajnas al mi, ke pluraj, kiuj vidis ĝin kaj gustumis ĝin, ne estos indiferentaj pri ĝia deveno. Mi mem deziras, ke ĝi longe pluvivu, hejme, simpla, akceptema, multifaceta, kiel unu el la koroj de la esperanta vivo.

Katrin'

NOVA STARTO POR A.E.R.A. (Amika Esperanto-Rondo Aĝenia)

"Ĝenerala" kunveno de AERA okazis la 25an de junio. Sep membroj ĉeestis. Du letere sin ekskuzis. Estis do ne-reprezentitaj 4 personoj. Jen la faritaj decidoj :

Nova oficiala responsularo : Jacques SIMONET (prezidanto), Yvan VIDOU (vic-prezidanto), Gastono FOURNIER (sekretario), Christian BAUDÉ (kasisto), Ursula REDOULEZ kaj Renée CHASSARD (membroj).

Por helpi en la estontaj diversaj aktivecoj iom post iom konsistiĝos pli larĝa "komitato" laŭ la emoj kaj kompeten-

toj de la personoj, kiuj interesiĝas konkrete partopreni en la taskaro.

Modifoj al la statuto :

La nova statuto de A.E.R.A. (esperantigita de Marcelo) enhavas nur 3 modifojn kompare kun la antaŭa :

Art.2. La geografia limigo (Aĝenio) estas forigita. Povas nun aliĝi, aktivi kaj kundedici en AERA ĉiu ajn esp-isto, el kiu ajn mndparto.

Art.6. De nun al la responsa komitato povas aparteni ankaŭ ne-membroj de SAT-Amikaro, sed la plimulto estu SAT-Amikaranoj.

Art.7. Antaŭe, la statuto menciis nur "internan periodaĵon" kiel propagandrimedon, nun "periodajn publikigaĵojn", kio ja entenas ne nur "**Laŭte!**" sed ankaŭ la broŝurservon.

Kotizo al A.E.R.A. :

La jara kotizo al AERA (sendependa de la abonoj al **L!** aŭ/kaj **Broŝurservo**) estas fiksita je 20 FF por 1990. Ni petas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri unu, pluraj aŭ ĉiuj aktivecoj de AERA sendi tiun ja simbolan kotizon ekde ĉi tiu jarfino. Iom "kompense" la abono al **L!** restos fiksita je 40 FF por 1990.

Biblioteko :

Jam konsistiĝas biblioteko de ĉiuj konsultebla. Estas bonvenaj ĉiuj donacitaj E-libroj !

Libro-servo :

La libro-servo de AERA funkcias la tutan jaron kaj celas ĉefe provizi la grupojn kaj unuopulojn per lern-materialo, kaj precipe tiun eldonitan de SAT kaj SAT-Amikaro. Listo aperos jarfine.

Kasedo-teko :

Ni ambicias kolekti kiel eble plej multajn el la ekzistantaj son-dokumentoj esperantaj. Donacoj estas bonvenaj, ankaŭ nur pruntoj por fari kopion destinitan al "enmueleja" uzado.

Eldon-rimedoj :

En aŭgusto estis decidite akiri pli modernan kaj de ĉiuj uzeblan eldonilon. Ni mendis kopi-presilon ĉe Rex-Rotary (modelo 1040), kiu estos liverita post unu monato.

Ĝi nomiĝos do "Aŭgusto la Dua", ĉar la unuan "Aŭguston" (ofsetilon) reprenos Rex-Rotary, taksante ĝian valoron je 18 000 FF (neniu perdo por AERA). Restos tamen pagendaj 62 027,80 FF + asekuron unujaran. La kaso de la broŝurservo povos tuj pagi 30 000 FF. Por la cetero ni bezonas donacojn, ĉar provizore ni elturniĝos nur per prunteprenoj. Trafa rimedo por helpi restas tamen la mendoj de broŝuroj el la tre grava stoko.

Broŝurservo de SAT :

Ni atendas ricevon de la nova presilo kaj reordigon de la tuta afero (inkluzive de la profesia "normaliĝo" de la situacio de la eldonanto) por daŭrigi la eldonadojn. Jam komence de septembro la tuta broŝurstoko estis lokita en novaj plaĉaspektaj bretaroj (10!) de la kunvensalono de "Cargue Sac".

La renkontiĝejo "Moulin de Beauville" fariĝos baldaŭ la nova sidejo de AERA, de la redakitejo de L! kaj de la broŝurservo. Ni decidis provizore konservi oficiale la adreson en F-47340 Laroque, ĉar tie Kribo kaj Solanĝa plu havas loĝejon, sed la abonantoj povas jam kutimiĝi sendi siajn leterojn al :

Esperanto * Cargue Sac
F - 47470 BEAUVILLE

kie jam daŭre loĝas Gastono (la sekretario) kaj plejofte troviĝas Kribo kaj Solanĝa. La telefonnumero estas :

53.95.40.26

(Tien nepre antaŭinformu, se vi intencas viziti la Muelejon!)

Spezoj por "Moulin de Beauville" :

Kvara listo de donacoj : J.L. 1500 - J.D. 50 - J.v.H. 100
A.F.S. 100 - N.P. 210 - F.R. 320 - Julia renkontiĝo 1786
J.C. 70. Sume : 4136.

Elspezoj : 3 tabletoj, 2 seĝoj, 1 raboto, littukoj
→ 551,15. Por la banĉambro : 6502,83.

Donace de F.D. : 1 faldebla lito.

Restas disponebla en tiu ĉi kaso por la Muelejo : ĉ. 4556 FF.

Plej koran dankon al ĉiuj mondonacintoj kaj ankaŭ al ĉiuj ŝvitdonintoj !

Kribo

"Aŭgusto la II-a" jus alvenis...

Iom pli frue ol anoncote, alvenis hieraŭ (89.09.21) la nova presilo.

Unua impresado post ekuzado : vere mirinde facile uzebla, tiu Aŭgusto la Dua ! Post kelkaj minutoj da iniciado, eĉ infano povos presi per ĝi.

Ĝi ebligas multajn aferojn, kiujn "Arturo" aŭ "Aŭgusto la Unua" ne facile aŭ tute ne ebligis, interalie, tuj reldoni, uzante fote la originalon.

Tuj estis prove reldonita, en malmulte da tempo, kaj estas do denove mendebla :

"Les Seize Règles de l'Esp."
(kodo SR, prezo 3 FF)

Ni provis ankaŭ represi redukte belan desegnaĵon de amikino **Vân**. La rezulton vi povas vidi ĉi-poste.

Domage, ne la tutan desegnon povis enteni la folio kaj la dorsflanko malkuliĝis. Sed estontece ni pli lerte elturniĝos, ĉu ne ? Kaj ni atendas multajn aliajn desegnojn de **Vân** !

La klarigo de la ĉi-sekva :

"En Vjetnamio la blanka tuko simbolas funebro"

* *
* *

Nu, bonvenon al
Aŭgusto la Dua !

Nun la nura, sed enorma, zorgo estas pagi ĝin. Do, ankaŭ ĉies donacoj kaj/aŭ broŝurmendoj estas bonvenaj !
AERA.

AMIKA ESPERANTO-RONDO AĜENIA (A.E.R.A.)

Cercle amical espérantiste de l'Agenais

STATUTO

Artikolo 1-a. STARIGO

Estas fondita inter la aliĝantoj al ĉi tiu statuto asocio sen lukra celo, regata de la leĝo de la 1-a de julio 1901 kaj la dekreto de la 16-a de aŭgusto 1901, kun titolo :

Cercle amical espérantiste de l'Agenais
Amika Esperanto-Rondo Aĝenia

Artikolo 2-a. CELO

Tiu ĉi asocio celas :

- propagandi kaj instrui la mondlingvon Esperanto ;
- aranĝi renkontojn por praktiki la lingvon ;
- starigi rilatojn inter esperantistoj el diversaj regionoj kaj landoj ;
- varbi membrojn por la asocio SAT-Amikaro kaj la asocio SAT, kies celo estas praktika uzado de Esperanto laŭ la difino en la artikolo 1-a de ĝia statuto.

Artikolo 3-a. SIDEJO

La sidejo estas fiksita ĉe jena adreso :

Cercle amical espérantiste de l'Agenais
ĉe Christian Baudé, F - 47340 Laroque

Ĝi povos esti translokita per simpla decido de la Komitato ; la ratifo de la ĝenerala kunveno de la aktivaj membroj estos necesa.

Artikolo 4-a. MEMBRARO

Amika Esperanto-Rondo Aĝenia konsistas el :

- aktivaj membroj : esperantistoj aŭ lernantoj konsentantaj pri la statuto;
- subtenantoj : personoj aŭ kolektivoj favoraj al Esperanto kaj helpantaj AERA-n.

Artikolo 5-a. MONRIMEDOJ

La monrimedoj de AERA konsistas el jara kotizo de la aktivaj membroj, fiksita ĉiujare de la ĝenerala asembleo laŭ propono de la Komitato, kaj la eventualaj donacoj de la subtenantoj.

Artikolo 6-a. ADMINISTRADO

AERA-n administras Komitato konsistanta el prezidanto, vic-prezidanto, sekretario, kasisto kaj du aliaj membroj.

La Komitato elektas ĝenerala asembleo de la aktivaj membroj por unu jaro. Ĝi estas reelektebla.

Eventuale demisiantan komitatanon provizore anstataŭigas la Komitato. La definitiva anstataŭigon certigas la posta ĝenerala asembleo.

La plimulto de la komitato konsistu el membroj de SAT-Amikaro.

Artikolo 7-a. PROPAGANDO

La propagandrimedoj de AERA estas :

- senpagaj kursoj loke aranĝitaj de membroj de AERA ;
- senpagaj kursoj per korespondado ;
- informkunvenoj pri la mondlingvo Esperanto ;
- periodaj eldonaĵoj ;
- ĉiu materialo necesa por propagandi Esperanton kaj aparte tiu eldonita de la asocio SAT-Amikaro.

Artikolo 8-a. ĜENERALA ASEMBLEO

La ĝenerala asembleo konsistas el ĉiuj aktivaj membroj de AERA. La Ĝ.A. kuniĝas ĉiujare en junio. Almenaŭ 15 tagojn antaŭe, la membroj estas kunvokitaj de la sekretario. La tagordo estas menciita sur la kunvokilo.

Ĉiu aktiva membro paginta sian kotizon disponas pri unu voĉo okaze de la voĉdonoj. Ĉiu decido bezonos la aprobon de la relativa plimulto de la membroj ĉeestantaj aŭ reprezentataj, sed la Ĝ.A. ĉiam devos strebi perdiskute atingi ĉiesvoĉan decidon.

Artikolo 9-a. ORDINARAJ KUNVENOJ DE A.E.R.A.

Dum ĉiu kunveno la ĉeestantaj membroj fiksas la lokon, kie okazos la sekvontan kunvenon de AERA kaj ĝian tagordon. Ĉiu propono, atinginta la kunvenejon estos pritaksebla, kondiĉe ke ĝi ne koncernu ŝanĝon de la statuto.

Artikolo 10-a. EKSTERORDINARAJ KUNVENOJ

Se necese, aŭ laŭ peto de unu el siaj membroj, la Komitato povas kunvoki eksterordinaran kunvenon.

Artikolo 11-a. STATUT-ŜANĜOJ - MALAPERO

Ĉi tiu statuto estos modifebla en ĉiu ĝenerala asembleo laŭ propono de aktiva membro aŭ de la Komitato. La decido bezonos la aprobon de la du trionoj de la aktivaj membroj ĉeestantaj aŭ reprezentataj.

La modifproponoj aperu en la interna bulteno aŭ cirkulero por averti la membrojn antaŭ la dato de la kunveno, kiam ili estos pritraktataj.

La malapero de AERA estos decidita nur samkondiĉe. Tiukaze, la mon- kaj material-posedaĵojn ricevos la asocio SAT-Amikaro.

ONI PLANTIS ESPERANTO-ARBON !...

Dumsomere, en vilaĝo proksima de Angoulême, okazis evento aparte rimarkinda. Pri tio jen raporteto de du junaj polinoj, kiuj ĉeestis :

"Sabate la 22an de julio, ni partoprenis en la aranĝo organizita de Angulemaj geesperantistoj en vilaĝo VOEUIL ET GIGET. Sesdeko da interesatoj kuniĝis por planti Esp-o-Arbon, simbolo de Frateco kaj Amikeco, esperante, ke la ieo de D-ro Zamenhof disvolviĝos tiel, kiel arbo floronta. Dank'al niaj gastigantoj la unuan fojon ni havis la eblecon spekti tian ceremonion. Inter la partoprenantoj estis ankaŭ du hungaroj, kiuj pere de Pasporta Servo, vizitas Francion. La solenaĵon malfermis la vilaĝestro, salutante ĉiujn partoprenantojn kaj dezirante al ni bonan etoson. Trinkante fruktosukon aŭ vinon ni babiladis kun Esperantistoj (por kelkaj estis la unua okazo praktiki la lingvon). Posttag-meze ni prezentis kelkajn impresojn pri niaj reciprokaj landoj - Polio kaj Hungario - al niaj francaj geamikoj. Ni forveturis alrigardante la Esperanto-arbon, ankoraŭ malforta, maldika, sed esperante, ke ĝi pli kaj pli fortiĝos."

Indas reliefigi la originalecon de tiu ceremonio tial, ĉar en neniu alia loko okazis io simila. Dum tiu ĉi 1989-a jaro multloke oni plantis arbon de Libereco, sed nenie arbon de l'Espero. La arbo, kiu de nun staros sur la placo de Voeuil et Giget prezentos simbolo de komuna sopiro al interkompreniĝo inter la popoloj, kaj sekve de Espero por mondo pli paca kaj humaneca.

komunikis **Leo**.

L! petas recenzemulojn !

Imagu la ĉagrenon de la redaktanto-presanto-administranto, kiam li krome ricevas por recenzo librojn, gazetojn, kasedojn! Li tute ne kompetentas kaj eĉ se li aŭdacus tion fari, iomete rakontante pri la enhavo de la ricevitaĵoj, li tamen ne havus tempon por ĝin esplori.

Do li nun provas almenaŭ mencii kelkajn interesajn aferojn, sed petas volontulojn por pli indaj recenzoj.

Antaŭdankas, Kribo

INFORMADO PRI ESPERANTO EN FRANCIIO

- pluraj imitendaj ekzemploj -

* La gazeto "**L'Echo des Parents d'Elèves**" (Eĥo de la Gepatroj de Lernantoj) de FPEEP, en sia numero 98 de junio 1989 publikigis bele prezentitan, argumentoplenan artikolon kun titolo "**L'Esperanto, langue internationale, utopie ou réalité du XXI-e siècle**". Subskribis ĝin : Centre Esperanto de la région lyonnaise (7 rue Major Martin, 69001 LYON. Kunlaboris : M. MIQUEL, Kolegio Jean Moulin de VILLEFRANCHE.

"**Non-Violence Actualité**", monata gazeto eldonata de MAN (Movado por Alternativo Neperforta) en sia numero - interesege - de majo 1989) mallonge recenzas pri la broŝureto (nun ĵus elĉerpita, sed reeldonebla se estas interesatoj...) "**Linguistique et Non-violence**" de Henri Masson. Por pli bone koni MAN, notu, ke restas disponebla teksto pri ĝia politika orientado "**Politika Neperforto**". Adreso de N.V.A. : 20 rue du Dévidet, F 45200 MONTARGIS.

En rubriko provizata de la legantoj la konata regiona ĵurnalo "**Sud-Ouest**" aperigis la 30an de aŭgusto drastan leteron de D-ro Valois, de Laroque-Timbaut, pledanta por Esperanto. D-ro Valois estas jam de longe amiko de Esp-o. Tion ja scias la legintoj de lia nekonformisma libro "Vos Chaînes", ĉu ne ? "Vos Chaînes" restas mendebla ĉe AERA (70 FF, inkluzive de la afranko). Vi ne bedaŭros! Nova libro de "Docteur Jacques" estas prespreta...

VERDA ŜIPO PEREONTA...

En sia numero 51 "**La Kancerkliniko**" - kiu naskiĝis preskaŭ samtempe kiel Laŭte - alarmas : "Ĉu ni dronos?" LKK bezonas nepre 50 novajn abonantojn en pagipovaj landoj. La abonprezo estas 95 FF por 4 sinsekvaj numeroj + kromnumero. Adreso : Jak Le Puil, "Les Cochérats", F-18210 THAUMIERS, pĉk: 12729 73 X Paris.

Dum jaroj LKK grave kontribuis siamaniere al riĉiĝo de la E-kulturo. Ne lasu ĝin droni!

Kribo



Ni ricevis :

Novan disketon de NIKOLIN' (eldonita de LF-Koop) :

"La Esperanto-Knabino" jen la titolo de tiu disketo, kiu entenas kvar kanzonojn verkitajn de la duopo Tarallo-Silfer (3 en esp., unu en la franca). Fakte, la titoldona "Esperanto-Knabino" estas sekvata de la franca versio, kun teksto ne tre bonkvalita. Oni povas sin demandi kial G. Silfer, tiel rigora, preferis mem verki ĝin france, ol peti de franco... sed ni ne ĉikanu. Restas la ĝuo plian fojon aŭskulti Nikolin', ĉiam talentoplenan, plene mastrantan sian arton, kaj aparte feliĉ(ig)a en la de mi preferata "Serena Lulkanto". Eblas mendi ankaŭ ĉe SAT-BS : 40 FF plus afranko.

Kvar novajn broŝurojn de Ergoto de Bonaero :

**Karakole, karambole / La Ergoto de Ergoto /
Ergotado, versumado ! / Tambur-eŝo**

La legantaro de L! povas tiel retrovi la kunlaboranton de nia gazeto, kiun cetere li ofte laŭte mencias, foje eĉ iom tro laŭde por esti kredebla...

Ĉiu broŝuro estas mendebla kontraŭ 2,20 us-dol., 4,50 gld aŭ 5 irk-oj al Argentina E-Instituto.

Novan libron de la peranto de L! en Brazilo, G. R. LEDON

"Sennaciece tra nia Mondo"

Temas pri luksa libro (224 paĝoj), eldonita de "Fonto" por la aŭtoro. Multaj koloraj fotoj pri la landoj vizititaj de la aŭtoro. Laŭdire tiu libro estis cenzurita de SAT-redakcio : jen plia motivo por ĝin legi, pristudi, pridiskuti. Herezuloj ne tre abundas en nia tre konformismema E-mondo. Stefan Maul verkis tre trafan antaŭparolon, kiun necesus entute citi. Tamen nur jenon mi mencias : "...Certe vi ne konsentos al ĉiuj asertoj kaj argumentoj de l'aŭtoro, sed mi estas certa ke kun plezuro vi akompanos lin dum la vojaĝo ĉirkaŭ la muroplena terglobo, kaj mi krome estas konvinkita, ke leginte la libron vi adoptos la sennaciecon, por kiu tiel klare kaj inteligente li pledas."

Mendu rekte al la aŭtoro.

"Esperanto... Zamenhof, bildrakonte"

Jen finfine la unua bildrakonto pri Zamenhof ! Nun havebla en la franca, baldaŭ ankaŭ en esperanto. Eldonis SONORILO. Kunverkis : Gilenino TILLEUX, Bruno DISANO, Johano-Marko DERZELLE. Mendebla al J.M. Derzelle, 10 Hauts de Meuse, B-5101 Namur, kontraŭ 30 FF (+ afranko) al jena pĉk : 000-0968225-68.

Jen ŝtopita grava vakuo en nia porinfana literaturo! Ĉu perfekta, plene respondanta la bezonojn kaj spirito-staton de la nunaj infanoj, mi ne scias. Ŝajnas al mi, ke ĝia enhavo ege kontrastas kun tiu de la bilstrioj, kiujn nun kutime legas niaj buboj. Temas ne pri militoj nek pri sangoplenaj aventuroj, sed nur pri paca batalo por pli frateca mondo. Ĉu tio estas ankoraŭ laŭmoda ? Esper-eble, troviĝos multaj junaj entuziasmoj por rekompenci la kunaŭtorojn, kies talento certe ne limiĝos je tiu ĉi unua verko. Gratulon kaj dankon !

Vipan kanzon/leteron kontraŭ la aŭtoro de "Esperanto Moderna" ni ricevis de anonimulo. Sed ĉu utilas polemiki kontraŭ aliaj projektoj ? Por mi tute valoras la konkludo de André GILLES sur la p.47 de tiu ĉi L!

Du numerojn de la "Interna Informilo de Sorokaba E-Klubo". Tre simpatia bulteno, kies adreso estas : Rua da Ponha 455, Cx. postal 234, BR-18.100 SOROCABA. Se vi deziras ligi kontaktojn kun ties grupanoj, nepre notu ĝin!

Alvokon por ke oni sendu amase dankleterojn al : AJUNTAMENT, Praça Sant Roc, 1 - E-08201 SABADELL. Kial ? Tial, ĉar en Sabadell, ĝuste en Bulvarado de D-ro Zamenhof, estos starigita granda monumento honore al... doktoro Zamenhof. La monumento estos 12 metrojn alta kaj konsistos el kvar metalaj kolonoj, kies simbolo estas: Esperanto en la 4 kardinalaj punktoj de la mondo. Sur la plej alta kolono staros kvinpinta verda stelo kun unumetra diametro. Freneze, ĉu ne ?

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque. CPPAP n°58651

-- la venonta numero ? Fine de novembro. Ĝis !